

# *Bulgaria* **ESPERANTISTO**



## E N H A V O

|       |                                                                        |       |
|-------|------------------------------------------------------------------------|-------|
| * * * | La plej grava, la ĉefa . . . . .                                       | 1     |
| * * * | Deklaracio de la Literatura Sekcio de BEA . . . . .                    | 2     |
| * * * | La militiro de la mumioj . . . . .                                     | 3     |
|       | <b>Orlin Orlinov.</b> Ĉilia fiesta. Traduko de Asen Grigorov . . . . . | 5     |
|       | <b>Marin Băcev.</b> Celebre de Georgi Karaslavov . . . . .             | 7     |
|       | <b>Asen Grigorov.</b> Georgi Karaslavov 70-jara . . . . .              | 8     |
| * *   | Слово на Георги Караславов . . . . .                                   | 11    |
| * *   | Parolado de Georgi Karaslavov . . . . .                                | 11    |
| * *   | Adreso al Georgi Karaslavov . . . . .                                  | 13    |
|       | <b>Krăstju Karucin.</b> Verkoj de Georgi Karaslavov en Esperanto       | 13    |
|       | <b>Georgi Karaslavov.</b> Subskribo por la paco. Traduko de Kunĉo      |       |
|       | Vălev . . . . .                                                        | 14    |
|       | <b>Ivan Draganov.</b> Neatendita vizito . . . . .                      | 18    |
|       | <b>Haim Levi.</b> La unua atomsuno sur la Balkana Duoninsulo . . . . . | 20    |
|       | <b>Minko Conkovski.</b> Vespero de la Esperanto-verkaro . . . . .      | 21    |
| * *   | Per Esperanto tra la mondo (pri la ekspozicio de Pro-                  |       |
|       | dan Prodanov) . . . . .                                                | 22    |
| * *   | Решения на ЦС на Съюза на българските филатели-                        |       |
|       | сти и ЦК на Българския есперантски съюз . . . . .                      | 23    |
|       | <b>Georgi Mihalkov.</b> La Oka Nacia Junulara Esperantista Kon-        |       |
|       | ferenco . . . . .                                                      | 23    |
|       | <b>Boris Popov.</b> „Paco“ — nova serio . . . . .                      | 24    |
|       | <b>Nano Kjuĉukov.</b> E. A. Bokarev — elstara soveta scienculo-        |       |
|       | esperantisto . . . . .                                                 | 25    |
|       | <b>Prof. d-ro Stojan Ĝuĝev.</b> Enkonduko en la fonologion de          |       |
|       | Esperanto . . . . .                                                    | 27    |
|       | <b>Agnia Barto.</b> Koleras mia paĉjo. Traduko de Klara Rabinoviĉ      |       |
|       | <b>Marin Băcev.</b> Enigmo kaj kriptogramo . . . . .                   | 30-31 |
| * *   | Koncize . . . . .                                                      | 31    |
| * *   | „Interligilo“ . . . . .                                                | 31    |
| * *   | Internaciaj E-kursoj en Burgas . . . . .                               | 32    |
| * *   | Literatura „Patrol“-konkurso . . . . .                                 | 32    |
| * *   | Tra la gazetaro . . . . .                                              | III   |
| * *   | Deziras korespondi . . . . .                                           | IV    |

### *Sur la kovrilpaĝo :*

„La monumentoj“—historia loko apud urbo Svištov, kie la soldatoj de la frata rusa popolo en 1877 j. unuafoje surpaŝis la bulgaran teron, portante nian liberigon el la nigra 500-jara otomana jugo.

La partoprenantoj en la Oka Nacia Junulara Esperantista Konferenco metis florkronon antaŭ monumenton de la pereintaj rusoj-liberigintoj (vidu paĝon 23).

**LA PLEJ GRAVA, LA ĜEFA...**

*La historio nin instruas, ke decidan signifon por la venko de unu sociordo super alia havas la socia produktiveco de la laboro. La granda Lenin diris: „La produktiveco de la laboro estas finfine la plej grava, la ĉefa por la venko de la nova sociordo. La kapitalismo kreis produktivecon de la laboro, kiun la feŭdismo ne konis. La kapitalismo povas esti definitive venkita kaj estos venkita per tio, ke la socialismo kreas novan, multe pli altan produktivecon de la laboro.“*

*La senĉesa plialtigo de la laboraktiveco estas la plej grava kondiĉo por kreskigo de la socialisma produktado kaj de tie — por plialtigo de la popola bonstato. Tial ĝi estas objektiva leĝo de nia socia disvolviĝo.*

*La Nacia Konferenco de la Bulgara Komunista Partio, kiu okazis je la 20—22 de marto ĉ. j., estis plene dediĉita al la problemoj pri la socia produktiveco de la laboro — unu el la bazaj, esencaj problemoj, ligitaj kun la praktika realigo de la ĝenerala linio de la Partio por konstruo de matura socialisma socio.*

*Kiel plej supera forumo de la Partio, la Nacia Konferenco kree pridiskutis kiel la enkondukan paroladon de k-do Todor Jivkov — la unua sekretario de CK de BKP, tiel ankaŭ lian analizon raporton, dediĉitan al la socia produktiveco de la laboro, al la kondiĉoj kaj la vojoj por ĝia kreskigo.*

*La Konferenco profunde analizis la rezultojn de la realigado de la Sesa Kvinjara Plano por disvolviĝo de nia lando kaj donis linion de intensa evoluo de nia ekonomio, linion de rapida plialtigo de la socia laborproduktiveco.*

*En siaj direktivoj la Deka Kongreso de BKP montris la neceson de plua intensigo de nia ekonomio. Sur tiu ĉi bazo la Kongreso starigis la taskon, ke minimume 95% el la pligrandiĝo de la nacia enspezo, 80% el la industria produktaĵo kaj la tuta pligrandiĝo de la vilaĝmastruma produktaĵo estu certigitaj per plialtigo de la laborproduktiveco. Tiu ĉi eksterordinare grava tasko, ligita plej senpere kun la batalo por plialtigo de la popola bonstato, postulas nun de ĉiuj laboruloj produktadi pli multajn kaj plej bonkvalitajn ellaboraĵojn, respondantajn al la nuntempaj postuloj, produktadi per pli malmultaj elspezoj de laboraj, materialaj kaj financaj rimedoj. Ĉe la socialismaj kondiĉoj en nia lando, kie estas likvidita la ekspluatado de homo fare de homo, ekzistas ĉiuj premisoj organizi altefektivan kaj altproduktivan laboron, kies fruktoj estas utiligataj nur por plibonigo de la popola vivo.*

*La Nacia Partia Konferenco prenis gravajn decidojn. Ĝi alvokis nian tutan popolon, ĉiujn laborulojn surbaze de ankoraŭ pli alta laborproduktiveco, de konscia alta disciplino kaj racia organizo de la produktado, de decida kaj ĉiuloka batalo por ŝparado de krudaĵoj, materialoj, energio ktp., de batalo por modernigo kaj rekonstruo de nia industrio kaj vilaĝmastrumo sur nuntempa bazo — doni sian kontribuon por plialtigo de la nacia enspezo, por realigo de la Decembra Programo de BKP pri seninterrompa plialtigo de la popola vivnivelo.*

*Antaŭ la bulgaraj esperantistoj — nedisigebla parto de sia laborpopolo — staras la respondecata tasko kune kun ĉiuj laboruloj aktivigi siajn kreaĵojn fortojn, por ke la decidoj de la Nacia Konferenco efektiviĝu. La batalo por pli alta socia produktiveco de la laboro estas batalo por nia plua sukcesa disvolviĝo survoje al la matura socialisma socio. Tio estas batalo por la bono kaj la feliĉo de nia tuta popolo, de ĉiu aparta civitano de nia Respubliko. Tiu estas batalo por paco kaj fruktodona interpopola kunlaborado en la nomo de la plej helaj homaj idealoj.*

## DEKLARACIO

### *De la Literatura Sekcio de la Bulgara Esperantista Asocio*

*La malica kontraŭsoveta kampanjo de la okcidenteŭropa reakcia gazetaro lastatempe ege intensiĝis. La reakciaj rondoj malkontentas pri la kreskado de l' aŭtoritato de Sovetunio kiel batalanto por paco, por paca konekistado inter la popoloj, por likvido de la restaĵoj de la malvarma milito. Al ili ne plaĉas la tendenco pri paca solvo de la mondproblemoj. Kaj ili ne eltenis. Por pentri nigra kaj misfamigi Sovetunion, ili nun elektis la momenton plej konvena kaj eliris el siaj arkivoj la malpuran paskvilon de Soljenicin „Arkipelago Gulag“, kiun ili dum pluraj jaroj tenis en siaj kasoj. Per la publikigo de tiu ĉi pseŭdoliteraturaĵo la reakciularo celas denove inciti la malvarman militon kontraŭ Sovetunio.*

*La Sekcio de Literaturistoj de BEA en la nomo de siaj membroj — poetoj, verkistoj kaj tradukistoj — esprimas sian indignon kontraŭ la perfida agado de Soljenicin. Tiu fihomo vivis en sia patrujo, manĝis la panon de sia popolo kaj ĝuis ĝiajn bonaĵojn, sed samtempe en sia verko „Arkipelago*

*Gulag“ li bedaŭras, ke la atoma bombo, posedata nur de Usono en 1945, ne estis jetita por definitiva frakaso de USSR.*

*La Sekcio de Literaturistoj de BEA solidariĝas kun la kondamno de la soveta gazetaro, de la konstruantoj de l' socialismo, de la homoj de l' scienco kaj kulturo en USSR, de la publika opinio en la socialismaj landoj kaj la progresemaj fortoj en la kapitalisma mondo.*

*Por ni, bulgaroj, Sovetunio estas lumturo de libereco, demokratio, sociala justico kaj paco.*

*Ni bone memoras 1944 — la jaron de nia liberiĝo el la faŝismo. La libercon ni atingis per la decida helpo de Sovetunio. Ni neniam forgesos la malavaran, fratan kaj senprofitan helpon, kiun USSR donis kaj donas al ni ĉe la konstruado de l' socialismo kaj la konservo de la paco.*

*Hodiaŭ ĉekape kun USSR ni kaj la tuta socialisma landaro iras al plua progreso, al daŭra paco kaj feliĉo de la popoloj.*

*Prezidanto de la Literatura Sekcio de BEA: Asen GRIGOROV*

*Estraranoj: Ljuba BOJAĜIEVA, St. KOSTADINOV, Violin OLJANOV*





En Ĉilio furiozas faŝistaj generaloj kaj admiraloj, moknomataj „mumioj“. Ilia militiro celas ekstermon de ĉiuj alipensantoj.

Ĉi-sube ni publikigas du rakontojn de fuĝintoj el la faŝista infero en Ĉilio.

Rakontas R. GONZALES:

Mi estis instruisto en lernejo de Santjago. Je la 11. de septembro mi kun kolego veturis al mia laborloko. En la aŭtobuso mi aŭdis pri la ŝtatrenverso. Ni tuj ŝanĝis la aŭtobuson kaj post nelonge atingis la industrikvartalon Kordon Serilos. En fabriko „Ĉif“ kolektiĝis ĉirkaŭ cent kamaradoj — laboristoj, studentoj, loĝantoj en la kvartalo. Ĉiu el ni preparis sin por defendi la fabrikon. Post duonhoro oni sieĝis nin. Pafante, la faŝistoj provis enpenetri la ejon. Ni defendis nin. La fusiloj ne sufiĉis por ĉiuj, sed malgraŭ tio ni kontraŭstaris pli ol dek horojn.

Fine la militistoj sukcesis okupi la fabrikon. Oni senvestigis nin ĝis la talio kaj ordonis, ke ni tenu la manojn malantaŭ la nuko. Elirante el la fabriko ni vidis amason da murditaj laboristoj. Ĉirkaŭ la kadavroj ruĝis homa sango. Oni veturigis nin al la stadiono.

Post dek kvin tagoj oni denove senvestigis kaj kondukis min en ĉambron kun mallevitaj kurtenoj. Tie min atendis kvar aviadistoj, infanteria oficiro kaj civila policano. Oni sidigis min en fotelon. La civilulo anoncis, ke mi faris kelkajn krimojn: atencon kontraŭ la lokaj gvidantoj de la Nacia Partio, detruon de akvokondukilo kaj partoprenon en komploto „Z“. Mi, kompreneble, neis. Responde oni batis min ĝis perdo de konscio.

Iumatene oni pelis min el la ĉelo por „gimnastiko“. En la korto de la areŝtejo mi vidis pli ol dek virinojn, tonditajn kaj senvestigitajn. La gardistoj asertis, ke ili estas frenezaj.

Tamen tio estis nura mensogo. Mi ja konis iujn el la inoj, ili apartenis al la du partioj — socialista kaj komunista. Ankaŭ ili „gimnastikis“ sub vipoj kaj kolboj. Iu el la virinoj perdis fortojn kaj falis teren. Oni senkompatе batis ŝin. Alia virino ankaŭ falis teren kaj petis kelkajn gutojn da akvo. Faŝista oficiro kriaĉis: „Nenian akvon al marksistoj, morton al ili!“ Kaj la fiulo stampfis ŝin kruele.

Ĉiunokte ni aŭdis, kiel militistoj mortpafas arestitojn.

Iutage mi vidis en la korto la sekretarion de la regiona junsocialista organizo. Liaj manoj estis ligitaj sur la dorso. Policano aliris min kaj ĉenis ankaŭ miajn manojn. Nin ambaŭ oni puŝkondukis sur la rubejon. Tie faŝista oficiro direktis al ni sian pistolon kaj minacis mortpafi nin, se ni ne konfesos pri ia komploto, preparita de adeptoj de Al-lende. Ni unuvoĉe deklaris, ke ni aŭdis nenion pri ia komploto. Tiam la faŝisto ordonis al la ĉeestanta serĝento: „Faru la neceson por paroligi ilin!“

Oni pendigis nin kun la kapo malsupren. La oficiro staris apude kaj ripetadis: „Nu, ĉu vi ekparolos?“

Ni mutis. Tiam la oficiro ordonis al la serĝento, ke li malfermu niajn buŝojn per malŝraŭbilo. Tamen ni silentis!

Rakontas ROBERTO:

... Mi kredis, ke oni mortigos min. Mi ne bedaŭris, ĉar la torturoj estis netolereblaj. Je la 11. aŭ 12. de septembro oni sciigis min, ke baldaŭ kunsidos la milita tribunalo.

Mi kun kelkaj kamaradoj estis enkondukita en la juĝejon. Ni ĉiuj estis malpuraj, nerazitaj, ĉifonaj.

La tribunalon prezidis majoro Hans Vever, la sama, kiu esplordemandis kaj torturis min. La ceteraj „juĝistoj“ estis unu kolonelo el la militpolico kaj paro da aviadistoj. La „ĉefjuĝisto“ ne permesis al mi pledi, li tuj tralegis la

„verdikton“ kaj ordonis al la soldatoj forkonduki min. Laŭ la „verdikto“, mi devis esti ekzilita en Jakabu — en la nordon de la lando, en la militzonon de la Unua Divizio. Oni diris al mi, ke en ĉi tiu koncentrejo mi devos pasigi 36 jarojn! „Pro kio?“ — mi demandis. Oni „afable“ respondis al mi: „Pro agitado favore al la renversita registaro, pro nelaŭleĝa posedo de armilo, pro mortigo de oficiroj kaj partopreno en komploto „Z“.“

Mi volis refuti la mensogojn, sed oni ŝtopis al mi la buŝon kaj ŝlosis min en la stalo. Tio okazis sabate, la 18-an de novembro. Dum la nokto oni kondukis min kune kun ses arestitoj en la necesejon. Tiel procedis la oficiroj ĉiam, kiam ili estis drinkintaj. Iu el niaj gardistoj en soldatuniformo apenaŭ staris sur siaj piedoj. Dum ni iris al la necesejo, la gardistoj lasis nin en la korto kaj deflankigis en la ejon, kie drinkis iliaj kolegoj. En tiu momento iu el ni flustris: „Kamaradoj, nun aŭ neniam — ni fuĝu!“

Ni ĉirkaŭrigardis kaj ekvidis kanal-tubon por malpuraj akvoj. Supozante, ke ĝi gvidos nin al la libera mondo, ni nin ŝovis en ĝin kaj rampis kaj rampis, batalante kun ratoj kaj diversaj

*La ĉiliaj barbaroj*



insektoj. Fine nin karegis freŝa aero. Ni elrampis sur ian malgrandan placon. Sed tuj ni komprenis, ke ĉi tie nin atendas nenio bona. Se nin vidos la gardistoj, ili senhezite mortpafos nin. Ni ne sciis, kion entrepreni. La placon ĉirkaŭis dornarbustoj. La ĉielo iom post iom heliĝis. Ni ne disponis tempon por hezitado kaj decidis: kiuj el ni havas familion, iru hejmen, la fraŭloj, inter ili ankaŭ mi, kaŝu sin ĉe amikoj. Ni adiaŭis, ne dirante, kien ni iros. Tion ni faris pro singardemo.

Mi ekiris laŭ fervojo kaj baldaŭ atingis la internacian ekspozicion ĉe urbeto Vila Meksiko. En la periferio de la urbeto loĝis mia sampartiano. Mi eniris lian loĝejon kaj deklaris antaŭ li, ke mi ne povas reveni hejmen, ĉar la faŝistoj murdis mian pli aĝan fraton kaj la patrinon enprizonigis.

Mi pasigis la nokton ĉe mia sampartiano. En la najbara domo sin kaŝis ankoraŭ du kamaradoj. Mi kontaktigis kun ili kaj proponis, ke ni triope serĉu rifuĝejon en iu ambasadorejo. Ni interkonsentis kaj iris en la kvartalon de la diplomatoj. Proksime estis la Venezuela Ambasadorejo. Kiam la policano forlasis por minuto sian posteron, ni transsaltis la murbarilon kaj eniris la korton. En la ambasadorejo ni trovis kelkajn kuracistojn. Unu el ili esploris min kaj konstatis, ke mi havas sangelfluon en la intestoj, kaj oni devas urĝe transfuzi al mi sangon. Mia lango, brulvundita per cigaredoj dum la tumultado, estis cikatra. Por ne resangigi ĝin, mi nutris min per supo.

Post kiam oni transfuzis en miajn vejnojn novan sangon, mia sanstato plibonigis, tamen mi devis kuŝi en la lito dum du monatoj. Ĉiuj rifuĝintoj frate zorgis pri mi.

Trifoje la generala hunto rifuzis al mi elirvizon. Fine, en la lastaj tagoj de decembro, oni informis min, ke mi povas elmigri al Kubo.

Mi atendis ĝis la 21. de januaro, *(sekvas sur p. 7.)*

# CILIA FIESTA\*

*Fragmentoj el poemo de Orlin Orlinov*

• • • • •

### III.

Kiel ni gojis, Ĉilio, pri vi !  
 Kiel ni ĝojis !  
 Ĉiu mitingo,  
 ĉiu danĝero —  
 estis niaj.  
 Niaj animoj estis la placoj  
 de kredo,  
 de amo,  
 de penso pri vi.  
 Ni vidis la ombrojn,  
 la paŝojn de l' nokto ni aŭdis.  
 Ni sentis kiel  
 iu mallaŭte pafilojn ĵargadis ...  
 Ni kaptis la flustron de nigraj buŝoj,  
 nigraj pensojn dirantaj en la obskuro ;  
 koruptoj,  
 aĉetoj,  
 bankaj kontoj sekretaj,  
 interflustrado de konspirantoj spertaj  
 kaj nove-kovitaj marionetoj ...  
 Ĉu nur vi,  
     Ĉilio,  
     ne aŭdis ?  
 Ĉu nur vi,  
     Ĉilio,  
     ne komprenis  
 kiu la unua devas bati ?

VII.

Nigraj vizagoj —  
lafo rigida.  
Nigraj kaskoj —  
lafo rigida.  
En ĝusta horo,  
ĝuste laŭ plano  
ĉio finita.  
Venkas la hunto perŝita.  
Ne sufiĉas la kredo sen ŝancel'!  
Ne tlmigas perŝingra defio!  
Ĉilio, Ĉilio!  
Ĉu vi ne komprenis kial Fidel<sup>o</sup>  
ankoraŭ kunportas pistolon ĉe la talio?  
La vero ne devas esti kaŝata.  
Ne estas necesa herooa dekor'!  
Ne disbatiĝis per forto rebata  
la Bartolomea teror'.  
Vekas doloron tiuj argumentoj.  
Sed naskas vivon ankaŭ la dolorprofundo.  
Kiom da bajonetoj kaj kiom da  
regimentoj

haltis la movon perfidan de l' hunto ?  
Pri Ĉilio, pri la bloko, pri libereco  
la generaloj ne volas scii ja.  
La generaloj ricevas duoblan salajron —  
la dua — donata de CIA<sup>3</sup>  
**Bastonoj, batu ! Paŝiloj, fajron !**  
Kie estas Corvalan<sup>4</sup>, Judaso ?  
Jen la kvincent mil eskudoj.<sup>5</sup>  
**Brave, Judaso !**  
**Bonega ĉaso !**  
Kie estas Neruda ?<sup>6</sup> En kliniko ?  
Kancermalsana ?

**Antaŭ la tombo ?  
Brave al la kancero !**

Poeto, Nobel-laureato . . .  
Maloportuna afero . . .

Leviĝas la ministoj el Ĉutikamato . . .<sup>7</sup>  
Tro malfrue!  
En ĉiuj enciklopedioj kaj vortaroj tiu vorto—  
liberalismo — en ĉiu lingvo,  
ĉilia frato,  
estas mitraletoj, teroro kaj morto.  
Ekmarŝas la dokistoj el Antofagasta . . .<sup>8</sup>  
Tro malfrue!  
La verda ombro de l' tanko  
staras jam en pozicio mastra  
en la ombro  
de l' Usona Banko.

## VIII.

Ho, kiel doloras pro la venk' frakasita !  
Ho, kiel mallonge daŭris nia ĝoj' !  
Eniris en la Moneda-n kun okulo senvida  
la morto ne laŭ parlamenta voĵ' !  
Okazis tamen stranga ĉieliro  
kaj konsternite vidis la naci' :  
eliris morta kompanjero Allende,  
kondamnita vivi pro ĉiam ĉe ni !

## IX.

**Prezidento Salvador Allende,  
vi pereis en man' kun mitralet',  
vi pereis, kaj revivas legende —  
vi: standardo, kanto, afiŝo kaj kred'.**

Via fino estas nova komenco.  
 Ĉilio, antaŭen! Mi vidas vin jam:  
 kun ruĝa standard', en la lukto flirtanta,  
 kun mitraleto de Salvador en la man':

X.

Ĉu vi ĝin donas, Viktor Hara,<sup>9</sup>  
vian kanton kun ludo gitara?  
Via gitaro kun sep kordoj —  
se ĝi kunsonus nun kun la hunto,  
vi havus multe da mono dolara,  
viva vi restus, Viktor Hara!  
Viktor Hara ridas ĝissvene,  
ridas la stadion<sup>10</sup> senrete.  
Kantas kaj ludas Viktor Hara  
per la gitaro kun la sep kordoj,  
sed kantas ne pri la hunto kruela —  
kantas pri Ĉilio, pri l' nokto malhela.

Oni ŝiris la unuan kordon —  
la gitaro kantis,  
kiel kantis Ĉilio.  
Oni ŝiris la duan kordon —  
la gitaro ploris  
kiel ploris patrinoj.  
Oni ŝiris la trian kordon —  
la gitaro ĝemis  
kiel ĝemis la amataj en la mallumo ...  
Oni ŝiris la kvaran kordon —  
restis vivanta lia gitaro  
kiel pluvis la libereco ...  
Oni ŝiris la kvinan kordon —  
lia gitaro kriis por venĝo  
kiel kriadis la sang' de l' murditoj ...  
Oni ŝiris la sesan kordon —  
lia gitaro inspiris fajron  
en la animoj de novaj luktantoj.  
Oni ŝiris la sepan kordon —  
sed eĉ senkorda  
lia gitaro ludis marŝon,  
lia gitaro vokis la bravajn,  
lia gitaro vekis timemajn,  
lia gitaro densigis la vicojn —  
levu la frunton  
kontraŭ la honton!



Oni fortranĉis al li  
ambaŭ brakojn!

Sur stadiono Nacional  
tempesta tremo pasis skue:  
la morto de Hara estis signal',  
ke la batalo daŭras plue!

XII.

La Andoj vekiginte miras ...  
Andoj, kial vi nubajn brovojn kuntiras?  
Ah, jes ... Klare!

Al la domo de Pablo Neruda  
karabenistoj traserĉi iras.  
Kaj en apuda kliniko

Pablo Neruda en agonio  
kunpremas la lipojn pro dolor' pri Ĉilio.  
Li pensas:

jen min traserĉas  
— ironio de l' sort' —  
por la lasta fojo — ho ve! — la mort'.  
Ne necesas specfala racio —  
vi komprenas mem, miascie!  
La fajrero de Pablo brulas en la kor'  
de Ĉilio —

karabenistoj, serĉu ĝin tie!  
Ĉu vi ne sentas?

Vulkanoj sub viaj piedoj tremas!  
Vekiĝos la arbohakisto!  
La tago venas!

XIV.

Nun regas nokto.  
Sed estos via la matena klaro.  
Nun regas nokto.

Estos via la tag'.  
Senindulga estos la batalo —  
la lasta,  
la decida atak'!

Malproksimas la Andoj  
de Haemus,<sup>11</sup>

sed ni kredas,  
proksimiĝas la tag' pli kaj pli —  
ni ree aŭdos  
per „venceremos“  
resoni la placojn de Ĉili'!

XV.

Ĉilio mutas.  
Ĉilio ĝemas,  
malĝojas vee.  
Sed morgaŭ Ĉilio  
jubilos ree.  
Ĉilio libera kantos,  
jam maturiĝas en ĝi  
la protesto!  
La vivo estos  
unu

senfina  
festo!

El la bulgara tradukis: Asen Grigorov



<sup>1</sup> Fiesta — hispana vorto signifanta feston.

<sup>2</sup> Fidel. Fidel Kastro, ĉefministro de Kubo.

<sup>3</sup> CIA. Inicialoj de la Centra Esplora Agentejo (angle: Central Intelligence Agency; bulgare: ЦРУ — Централно разузнавателно управление).

<sup>4</sup> Luis Corvalan — ĝenerala sekretario de la Ĉilia Komunista Partio.

<sup>5</sup> 500 000 eksudojn la hunto promes's por la kapo de Corvalan.

<sup>6</sup> Pablo Neruda — mondfama ĉilia poeto, mortinta post la puĉo de la hunto.

<sup>7</sup> Ĉutikamate — karboriĉa regiono en Ĉilio.

<sup>8</sup> Antofagasta — ĉilia havenurbo.

<sup>9</sup> Viktor Hara — tutmonde fama ĉilia kantisto kaj komponisto, kruele murdita de la hunto sur stadiono Nacional.

<sup>10</sup> Stadiono Nacional. Granda sporta stadiono de Santiago, misfama pro tio, ke la hunto ĝin transformis en koncentrejon.

<sup>11</sup> Haemus — Balkan-motaro, situanta en Balkana Duoninsulo.

(el paĝo 4)

kiam grupe kun aliaj antifasistoj ni atingis Havanon per aviadilo. Kiam ni surpaŝis kuban teron, ni ploris pro ĝojo. Oni tuj veturigis min al hospitalo, kie sub la zorgoj de kuracistoj mi baldaŭ resanigis.

Finante mian rakonton, mi devas averti la legantojn, ke nin trafis granda malfeliĉo, sed ni ne kapitulacis antaŭ la faŝistoj. Neniu el la troviĝantoj en la koncentrejo petis pardonon de la faŝistaj oficiroj. Ni, ĉiliaj antifasistoj, neniam malfideligis al nia idealo, malgraŭ mortminaco. Ni neniam ĉesigos la batalon. Troviĝinte en la koncentrejo ni komparis nian sorton kun la stato de antinazioj dum la Dua Mondmilito. La faŝistaj kugloj kaj katenoj ne timigos nin. Ni ne silentos. Al la tuta mondo ni rakontos, kion ni travivis sub la jugo de generaloj-mumioj.

Ni apelacias al ĉiuj progresemaj homoj: Helpu liberigi ĉiujn kaptitojn de la faŝismo! Helpu liberigi nian karan Luis Corvalan, la ĝeneralan sekretarion de la Ĉilia Komunista Partio!

Ni batalos kaj venkos! Ĉilio estos libera!

La 6-an de februaro ĉ. j. en la salono de la Sofia E-societo „Maksim Gorkij“ okazis solena kunveno dediĉe al la 70-jara jubileo de unu el la plej elstaraj nuntempaj bulgaraj verkistoj kaj granda amiko de Esperanto — akademiano Georgi Karaslavov.

En la prezidantaro krom la jubileulo estis Nikola Aleksiev — prezidanto de BEA, Atanas D. Atanasov — membro de la Esperanto-Akademio, Asen Grigorov — E-poeto, k. a.

Raporton pri la vivo kaj la verkaro de Georgi Karaslavov faris k-do Asen Grigorov — lia malnova kaj proksima amiko ekde la tempo de la kruela faŝista reĝimo en nia lando. La raportanto per varmaj vortoj pentris la personecon de la jubileulo, lian sociagadon kaj imponan verkistan faron. Fortan impreson al la ĉeestantoj faris la rakonto pri la ligoj de Karaslavov kun multaj esperantistoj-aktivuloj en la pasinteco kaj nuntempe, pri la granda morala helpo, kiun li donis por firmigo de la Internacia Lingvo kiel kultura faktoro en la vivo de nia popolo.

Adreson al la jubileulo en la nomo de la Bulgara Esperantista Asocio enmanigis k-do N. Aleksiev.

Akademiano Karaslavov, kortuŝita kaj emociita, dankis pro la rilato de la bulgaraj esperantistoj al lia verkaro, al lia socia agado kaj al li persone.

La literaturan programon, konsistantan el fragmentoj de liaj verkoj, partoprenis Stefan Kiragiev, Vasja Petrova, Kunĉo Vălev, la geaktoroj de BET Belka Beleva, kaj Mihail Ĉobanov kaj la laŭreato de Dimitrov premio Maria Kirova.

Post la finiĝo de la celebrado la verkisto ankoraŭ longe restis en la salono parolante kun novaj kaj malnovaj konatoj esperantistoj.

*Marin Băcev*

## PRELEGOJ DE GEORGI DIMOV

Docento Georgi Dimov el Varna, membro de CK de BEA, vizitis vilaĝon Suvorovo en distrikto de Varna la 15-an de februaro j. k. Antaŭ pli ol 120 ĝelernantoj li prelegis je la temo „La problemoj pri internacia lingvo kaj ĝia solvo per Esperanto“.

La saman tagon vespere G. Dimov partoprenis grandan publikan kunvenon en la salono de la Popola Legejo, dediĉitan al la kontraŭalkohola propagando. Partoprenis ĉirkaŭ 400 personoj. En tiu kunveno li prelegis je la temo: „La multlingveco — barilo por la kultura interŝanĝo de la popoloj“.

Georgi Karaslavov naskiĝis en 1904 en vilaĝo Debar apud Pärvomaj, en Suda Bulgario.

Jam en la unuaj jaroj post la Septembra Ribelo de 1923 li komencis verki. Per siaj rakontoj, per sia literatura kaj publicista agado, li firme ekstaris en la frontaj vicoj de la proletaj verkistoj

En la verkaro de G. Karaslavov aperas elementoj, mankintaj antaŭe en la bulgara literaturo: revolucia romantikeco, klasbatala, komunista ideologio, konkreta, realisma priskribo de la herooj, de ilia vivmaniero, vivmedio. En nian literaturon Karaslavov enkondukis novan temaron kaj aplikis novan verkmanieron. Lia arto de prozisto atingis ĉiam pli altajn pintojn. Lia majstrecado de artisto ĉiam pli kaj pli perfektigis.

La romanoj „Daturo“ kaj „Bofilino“ kaj lia monumenta sesvoluma romano „Ordinaraj homoj“ estas klasikaj verkoj de la bulgara literaturo. En ili Karaslavov per metodo de socialisma realismo donas vastan bildon de la popolo vivo, pentras panorame la epokon, en kiu li vivis. Multaj aliaj verkoj — „Ĉe posteno“ (rakontaro), la novelo „Tango“ k. a., liaj teatraĵoj — la dramoj „Familio Gaberov“, „Voĉo popola“, „Ŝtono en la marĉo“, „Lenin eniris nian hejmon“, la dramigoj de „Bofilino“ kaj „Daturo“ — estas titoloj de verkoj, per kiuj tute ne finiĝas la listo de literaturaĵoj de tiu ĉi verkisto, viva klasikulo, unu el la plej elstaraj kaj signifoplenaj reprezentantoj de la bulgara literaturo. Havante kontaktojn kun diversnaciaj literaturistoj-esperantistoj, mi estis plurfoje impresita de ilia opinio pri la verkoj de Karaslavov.

Antaŭ kelkaj jaroj mi korespondis kun japana literaturistino el Sapporo. Ŝi

alte aprezis la romanon „Bofilino“ de Karaslavov kaj deziris traduki ĝin. La japanino akcentis la universalecon de la problemo *bopatrino* — *bofilino*, de la konflikteco inter la homrilatoj en la burĝa socio, en la burĝa familio, konflikteco, kiu sin bazas sur la privata propio.

\*

Kiamaniere mi kaj pluraj aliaj bulgaraj esperantistoj interkonatiĝis kun Karaslavov? Kiel li mem proksimiĝis al ni, fariĝis nia amiko kaj fidela adepto de Esperanto kaj post la liberigo de la Naŭa de Septembro — membro de E-Societo „Maksim Gorkij“, kaj se mi povas tiel esprimi min, mem fariĝis unu Maksim Gorkij por nia bulgara E-movado?

Mi faras tiun ĉi komparon, ĉar kiel Maksim Gorkij estis konvinkita kaj senrezerva subtenanto de Esperanto, tiel same G. Karaslavov estas principa kaj senrezerva subtenanto de nia lingvo. Plurfoje, per eldiroj kaj publikaĵoj, li firme apogis nian aferon, aprobis nian agadon, la agadon de la bulgaraj esperantistoj.

Georgi Karaslavov ĉiam, kiam estis necese, donis al nia Movado sian helpon, oferante sian tempon, akceptante nin korvarme, tiel, kiel oni akceptas proksimajn amikojn.

Kiam antaŭ kelke da tagoj oni komisiis al mi skribi raporton pri Karaslavov lige kun lia 70-jara jubileo, mi havigis al mi kaj legis diversajn materialojn, dediĉitajn al li, al lia verkaro, mi konatiĝis kun intervjuoj, rememoroj de liaj amikoj, artikoloj de kritikistoj. Kaj mi forgesis pri la skribado de mia raporto. Mi plene dronis en tiuj publikaĵoj kaj ne plu povis forlasi ilin — tiom interesaj kaj logantaj ili estis. En mia memoro aperis diversaj okazoj, intervidiĝoj, konversacioj kun Karaslavov.

Ili ĉiuj plejparte estas ligitaj kun Esperanto.

Kun G. Karaslavov mi interkonatigis ĉirkaŭ la jaro 1931. Niaj kontaktoj, pli aŭ malpli longaj, daŭris ĝis la liberigo el la faŝismo — ĝis 1944.

La unuan fojon ni vidis unu la alian en la periodo de bolanta politika kaj socia vivo, de leviĝo de la popola batalo kontraŭ la faŝista reĝimo de Cankov—Ljapčev, en la 20-aj jaroj.

Karaslavov loĝis kun sia familio en Sofio, en la laborista urboparto Jučbunar, sur str. Kiril i Metodi, proksime de mi, kiu loĝis en la najbara proleta kvartalo Banišora. Ofte kaj li, kaj mi vizitis la presejon de fratoj Bačvarov, troviĝanta ĉe la angulo de „Opālčenska“ kaj „Ohrid“.

Li simpatiis al nia Movado, eĉ lernis Esperanton.

Ni tiom interproksimiĝis, ke inter ni naskiĝis intima, kaj familiara amikeco. Ofte, preskaŭ ĉiutage ni estis kune, gastis kun niaj familioj unu al la alia, promenis kune.

En la redakcioj de „Balkana Laboristo“, de „Mejdunaroden Ezik“ kaj „Mejdunaroden Rabselkor“, en la presejo de Bačvarov kaj poste en mia hejmo Karaslavov havis la okazon observi la vivon kaj la aktivadon de proletaj esperantistoj en unu el la plej viglaj, amasaj kaj fruktodonaj, sed samtempe plej danĝeraj momentoj de nia agado sub la teroro de la faŝismo.

G. Karaslavov konas tre bone la Esperanto-movadon, li konas kaj ĝiajn gvidantojn, kaj multajn ordinarajn samideanojn de la malnova generacio ne malpli bone ol iu organizita, regula membro de la Sofia Societo „M. Gorkij“.

La rekono, la simpatio al nia lingvo ĉe Karaslavov restis ĝis nun la sama, kia ĝi estis en la periodo antaŭ 40 jaroj.

Pluraj eldiroj de Karaslavov favore al nia lingvo, al nia agado, al la Esperanto-movado kiel movado utila, patriota en la plej bona senco de tiu ĉi

vorto, grave influis kaj plu influas la publikan opinion en nia lando.

En 1959 j., okaze de la 100-a datreveno de la naskigo de Zamenhof, la verkisto aperigis artikolon, en kiu li diras: „Senbrue, persiste, metodike dum pluraj jardekoj niaj esperantistoj kun konado kaj bona gusto tradukadis kaj plue tradukas la plej bonajn verkojn de la bulgara belarta literaturo kaj ilin konigas al proksimaj kaj malproksimaj popoloj. Per Esperanto, kiu povas redoni kaj la ĝustan sencon, kaj la patoson de la versa parolo, malproksimaj nacioj el ĉiuj kvin kontinentoj, el insuloj kaj nekonataj landoj, ekkonis kaj ekkonas la inspirplenajn versaĵojn de Botev, Vazov, Javorov, Slavejkov, Poljanov, Smirnenski, Geo Milev, Vapcarov, la versaĵojn de niaj nuntempaj poetoj. Se la plej vasta literaturo kaj kultura interŝanĝo helpas por la reciproka ekkono de ĉiuj popoloj, kaj se tiu ĉi reciproka ekkono estas hodiaŭ grava kaj akra armilo en la batalo por konservo kaj fortikigo de la paco, niaj esperantistoj jam longe kaj lerte uzas tiun ĉi bonegan, profunde humanan armilon...“

La fakto, ke Georgi Karaslavov nun estas inter ni, pruvas lian speciale amikan rilaton al ni. Li prezentas por ni potencon moralan apogon. Lia aŭtoritato, lia personeco, lia nomo de eminenta verkisto, konata, amika kaj respektata de infanoj kaj grandaĝuloj, de gvidantoj kaj ordinaraj homoj, de la tuta popolo, donas al ni fortojn kaj kurageon batali sentime por nia justa afero, batali por amikeco inter la popoloj, por paco en la mondo.

La grandioza literaturo kaj socia agado de Karaslavov rabas de li multegan tempon. Ĉiu lia minuto estas okupata per laboro — senĉesa, persista, senripoza, senpaŭza laboro. Mi ne povas imagi, kiel estas ebla tia eltenemo ĉe homo, kiu suferas pro la sekvoj de la iamaj torturoj (li havas rompitaĵajn ver-

(Sekvas sur p. 13)



## СЛОВО НА ГЕОРГИ КАРАСЛАВОВ

по време на чествването на 70-годишния му юбилей, организирано от софийските есперантисти на 6. II. 1974 г.

Уважаеми другарки и другари,

Аз наистина съм много развълнуван от тази среща със софийските есперантисти, защото съм не само добър приятел на есперанто, но съм добър приятел и на редица есперантисти, някои от които виждам тук, между тях Асен Григоров, Никола Алексиев и още някои приятели.

Моето познатство и приятелство с есперантисти датира от-давна. Както тука др. Асен Григоров спомена, аз съм написал първия си предговор (казвам първия, защото досега съм написал може би 30 или 40), когато нашите есперантисти преведоха на есперанто „Тра ла венatego“ („През бурята“) от Христо Смирненски. Искам да се похваля, че след Девети Септември за второто издание на „Тра ла венatego“ написах нов предговор към този сборник и го написах с истинско удоволствие не само защото съм голям ценител на огромното писателско дело на Смирненски, но и защото смятах за свой дълг да не отказвам на моите приятели-

есперантисти.

Аз не съм съвсем бос, що се отнася до езика есперанто. Дадже в последния клас на педагогическото училище в Казанлък кореспондирах на есперанто с мои приятели. Но след това условията на живота ме грабнаха и нямах възможност да продължа по-нататък изучаването на езика.

Когато по онова време дойдох в София, др. Алексиев откри есперантски курсове в читалище „Христо Ботев“, но аз посетих само два от неговите уроци, защото бях извънредно ангажиран като секретар на IV партийен район, който тогава обемаше сегашния 3-и и 6-и район. Бях толкова много зает, че денем трябваше да се ровя и търся материали за в. „Поглед“, който редактирах, а вечер до късно трябваше да ходя по партийните организации и да уреждам там редица акции. Така че много неблагоприятни обстоятелства ми попречиха да мога да се възползвам от блестящите уроци, които др. Никола Алексиев предаваше на група любители на езика есперанто.

Моята първа преведена книга е също така на есперанто. Аз сега имам много преводи. Само „Снаха“ има 25 или 26 превода на ней-различни езици в милиони екземпляри тираж. Но когато тази книга беше преведена на есперанто, аз съм изпитвал вълнения, които не можех да изпитам при никакви преводи на различни езици, на които моите книги са преведени.

Др. Алексиев цитира





една моя мисъл за значението на есперанто. Аз смятам, че есперанто има извънредно голямо бъдеще. Прогнозите, че някога националните езици ще изчезнат и ще се създаде един единствен международен език, явно са несъстоятелни. Езиците ще се запазят, ще се обогатяват, но ще има и един език, който ще бъде връзка между всички културни народи в света. Тоя език ще бъде есперанто.

Аз не разбрах всичко от доклада на др. Григоров, но горе-долу се досещах какво той говори за мене. Предполагам — и вие ще се съгласите — че той доста ме похвали. Аз, разбира се, съм доволен от това, защото, както се казва, на похвали и господ се не сърди. Тук пред вас искам да изкажа моята сърдечна благодарност на др. Григоров не само за доклада, но и за неговото хубаво, приятелско отношение към мен. В продължение на няколко десетилетия нашите семейства бяха много близки, ние всекидневно бяхме заедно, но след Девети септември работата се разрасна така, че ние се разделихме. Пък и градът стана много голям. По времето, когато работехме, той имаше 200 000 жители, а сега 1 милион и 200 000. Др. Гри-

горов живее в един квартал, а аз в друг, горе-долу сме на 15—20 километра разстояние.

Аз съм безкрайно радостен и лично благодарен за тая среща, която ви е устроихте. Лично аз може би няма да имам много време, нито сили да уча есперанто, но ... моята жена се запали. Тя е стара есперантистка и даже запита откъде може да си купи учебник, за да опресни познанията си по езика. Надявам се, че сега тя, като възобнови познанията си и практиката си по есперанто, ще предаде любовта ни към международния език и на нашите деца — на нашия син и на нашите внуци. И аз се надявам, че един ден вие ще имате възможността да ги видите във вашата среда като есперантисти.

Още един път най-сърдечно ви благодаря за хубавите чувства и за изразеното приятелско отношение към мене. Надявам се, че аз и в бъдеще ще давам творби, които пък вие, есперантистите, ще преведете, за да могат чрез есперанто да стигнат до читателите в целия свят.

Пожелавам ви успехи, здраве и все по-голямо разпространение на есперанто като международен език.

(По магнетофонен запис)

## PAROLADO DE GEORGI KARASLAVOV

*en la celebrazo de mia 70-jara jubileo, organizita de la sofiaj esperantistoj je la 6. II. 1974.*

*Estimataj gekamaradoj,*

Mi vere tre emociiĝas pro tiu ĉi renkontiĝo kun la sofiaj esperantistoj, ĉar mi ne nur estas bona amiko de Esperanto, sed ankaŭ bona amiko de multaj esperantistoj, kelkajn el kiuj mi vidas ĉi tie, inter ili Asen Grigorov, Nikola Aleksiev kaj ankoraŭ kelkajn amikojn.

Mia konateco kaj amikeco kun es-

perantistoj datiĝas delonge. Kiel menciis ĉi tie k-do Grigorov, mi verkis mian unuan antaŭparolon (mi diras, unuan, ĉar ĝis nun mi verkis eble 30 aŭ 40), kiam niaj esperantistoj tradukis en Esperanton „Tra la Ventego“ de Hristo Smirneniski. Mi volas laŭdi min, ke post la Naŭa de Septembro<sup>1</sup>

<sup>1</sup> La Naŭa de Septembro 1944 j. — tago de liberiĝo de Bulgario el la faŝismo.

por la dua eldono de „Tra la Ven-  
tego“ mi verkis novan antaŭparolon  
por tiu ĉi verskolekto kaj mi verkis  
ĝin kun vera plezuro ne nur pro tio,  
ke mi estas arda ŝatanto de la  
grandega verkista afero de Smirnenski,  
sed ankaŭ ĉar mi opiniis, ke estas  
mia devo ne rifuzi al miaj amikoj-  
esperantistoj.

Mi estas ne tute nudpieda rilate al  
la lingvo Esperanto. Dum la lasta  
klaso de la pedagogia lernejo en  
Kazanlák mi eĉ korespondis en Espe-  
ranto kun miaj amikoj. Sed post tio  
la vivkondiĉoj kaptis min kaj mi ne  
plu havis eblecon daŭrigi la lernadon  
de la lingvo.

Kiam en tiu tempo mi venis Sofion,  
k-do Aleksiev malfermis Esperanto-  
kurson ĉe legejo „Hristo Botev“, sed  
mi vizitis nur du el liaj lecionoj, ĉar  
mi estis tro okupata kiel sekretario  
de IV partia distrikto de Sofio, kiu  
tiutempe ampleksis la nunajn III-an  
kaj VI-an distriktojn. Mi estis tiel  
okupata, ke tage mi devis esplori kaj  
serĉi materialojn por ĵurnalo „Pogled“,  
kiun mi reduktis, kaj vespere ĝis mal-  
frua horo vizitadi la partiajn orga-  
nizaciojn kaj organizi tie diversajn  
ogojn. Do, multaj nefavoraj cirkon-  
stancoj malhelpis min utiligi la bone-  
gajn lecionojn, kiujn k-do Nikola  
Aleksiev instruis al grupo da ŝatantoj  
de la lingvo Esperanto.

Mia unua tradukita libro ankaŭ  
estis en Esperanto. Nun mi havas  
multajn tradukojn. Nur „Bofilino“  
havas 25 aŭ 26 tradukojn en plej  
diversajn lingvojn en eldonkvanto de  
milionoj da ekzempleroj. Sed kiam  
tiu libro estis tradukita en Esperan-  
ton, mi sentis emociojn, kiajn poste  
mi povis senti pro nenij tradukoj en  
diversajn lingvojn, en kiujn miaj ver-  
koj estas tradukitaj.

K-do Aleksiev ĉitis mian penson  
pri la signifo de Esperanto. Mi opi-  
nias, ke Esperanto havas eksterordi-  
nare grandan estontecon. La prognozo,

ke iam la naciaj lingvoj malaperos,  
kaj kreĝos unu nura internacia  
lingvo, evidente estos senbaza. La  
lingvoj restos, ili pliriĉigos, sed estos  
ankaŭ unu komuna lingvo, kiu havos  
la rolon de ligilo inter ĉiuj kulturaj  
popoloj en la mondo. Tiu lingvo estos  
Esperanto.

Mi ne ĉion komprenis el la raporto  
de k-do Grigorov, sed pli-malpli mi  
konjektis, kion li parolas pri mi. Mi  
supozas — kaj ankaŭ vi konsentos  
kun mi, — ke li tre laŭdis min. Mi,  
kompreneble, estas kontenta pri tio,  
ĉar, kiel oni diras, pri laŭdoj ankaŭ  
dio ne koleras. Ĉi tie, antaŭ vi, mi  
deziras esprimi mian koran dankon  
al k-do Grigorov ne nur pro la ra-  
porto, sed ankaŭ pro lia bona, amika  
rilato al mi. En daŭro de kelkaj jar-  
dekoj niaj familioj estis proksimecaj,  
ni ĉiutage estis kune, sed post la Naŭa  
de Septembro la laboro tiel kreskis,  
ke ni disiĝis. Ankaŭ la urbo fariĝis  
tre granda. En la tempo, kiam ni  
laboris, ĝi havis 200 000 loĝantojn,  
nun — 1 milionon kaj 200 000. K-do  
Grigorov loĝas en unu kvartalo, mi —  
en alia, ni pli-malpli estas je distanco  
de 15–20 kilometroj.

Mi estas senfine ĝoja kaj persone  
danka pri tiu ĉi renkontiĝo, kiun<sup>\*</sup> vi  
aranĝis. Persone mi eble jam havos  
nek tempon, nek fortojn lerni Espe-  
ranton, sed ... mia edzino ekflamis.  
Ŝi estas malnova esperantistino kaj  
eĉ demandas, de kie ŝi povas  
aĉeti lernolibron por freŝigi siajn  
lingvosciojn. Mi kredas, ke nun,  
renoviginte siajn konojn kaj prakti-  
kon de Esperanto, ŝi transdonos nian  
amon al la Internacia lingvo ankaŭ  
al niaj gefiloj — al niaj filo kaj  
genepoj. Kaj mi esperas, ke iun tagon  
vi havos eblon vidi ilin inter vi kiel  
esperantistojn.

Ankaraŭfoje mi plej kore dankas  
vin pro la bonaj sentoj kaj pro la  
esprimita amika rilato al mi. Mi kre-  
das, ke mi ankaŭ estonte donos ver-

Kara kamarado Karaslavov,

La Centra Komitato de Bulgara Esperantista Asocio plej elkore vin gratulas konekse kun via hela 70-jariĝo. En via persono la bulgaraj esperantistoj ĉiam vidis kaj vidas grandan verkiston-realiston, neŝancebleblan batalanton por la granda afero de la Bulgara Komunista Partio, aktivan sociulon kaj kulturen aganton. Via nomo estas nedisigeble ligita kun ĉiuj pli signifoplenaj manifestadoj de la progresema bulgara literaturo el la tempo de la kapitalismo kaj faŝismo. Kun granda civitana kuraĝeco vi metis vian talenton serve al la batalo por pli da socia justeco kaj libereco, por tutpopola feliĉo. Kaj post la venko de la socialisma revolucio viaj literaturaj verkoj — rakontoj, noveloj, romanoj, dramoj, literaturkritikaj artikoloj kaj skizoj — aktive helpas la laborulojn en nia lando liberiĝi el la rusto de la privatproprietata socio, elkreski kiel konsciaj kaj inspiroprenaj konstruantoj de la socialismo en nia lando.

Sed la bulgaraj esperantistoj havas ankoraŭ unu motivaĵon ami kaj estimi vin profunde: vi estas konata ankaŭ kiel granda amiko de la internacia lingvo Esperanto, lingvo de la paco kaj amikeco inter la popoloj. En tiu ĉi lingvo jam aperis kelkaj viaj verkoj kaj ili fariĝis akiraĵo de la monda esperantista publiko! Ankaŭ via penso: „Posedi unu fremdan lingvon estas tutegale posedi unu armilon pli, kaj posedi Esperanton — tio signifas regi tutan arsenalon da armiloj de la kulturo“ — fariĝis flugilhava penso de la bulgaraj esperantistoj.

Ni deziras al vi, kara k-do Karaslavov, ankoraŭ multajn, multajn jarojn da vivo kaj fortega sano, por ke via talento povu pliriĉigi nian nacian literaturon per novaj verkoj, kiuj helpu nin en nia marŝo antaŭen al la helbrilaj suproj de la komunismo!

Sekretario: ST. KOSTADINOV

Prezidanto: N. ALEKSIEV

koŝn, kiujn vi, la esperantistoj, tradukos, por ke ili povu pere de Esperanto atingi legantojn en la tuta mondo.

Mi bondeziras al vi sukcesojn, sanon kaj ĉiam pli grandan disvastiĝon de Esperanto kiel internacia lingvo.

*Laŭ magnetofona surbendigo*

(el paĝo 9)

tebrojn de la spino, malfacile moviĝas, suferas malsanojn de la internaj organoj pro la kaŭzitaj lezoj). Kaj kiam mi devas iri al li lige kun ĉu Esperanto-afero, mi komencas dubi: ĉu li vere akceptos min, ĉu li oferos tempon, pri kiu li ne disponas? Kaj mi neniam ricevis rifuzon.

(Plue k-do Grigorov rakontis rememorojn pri G. Karaslavov ligitajn kun Esperanto kaj la esperantistoj.)

VERKOJ DE GEORGI KARASLAVOV  
EN ESPERANTO

#### Beletro

Ĉe posteno. Elektitaj rakontoj. (Antaŭparolo de Hr. Radevski). Eld. „Mejdunaroden Ezik“. Sofia, 1932, 63 p., 16<sup>o</sup>.

Enhavas: Ĉe posteno, trad. B. Ivanov (As. Grigorov); Lasta deĵoro, trad. Hrima (Hr. Gorov); Ĥoro, trad. A. Las (At. Lakov); Hazardo, trad. Hrima; La standardo, trad. B. Ivanov; Kontraŭnulo, trad. B. Ivanov.

Bofilino. Romano. Tradukis el la bulgara originalo Simeon Simeonov kaj Asen Simeonov. (Antaŭparolo de Asen Grigorov, ilustraĵoj de Boris Angeluŝev). Fremdlingva Eldonejo, Sofia, 1959, 327 p., 8<sup>o</sup>.

— Fragmento en: Simeonov, Simeon M. Esperanta Krestomatio, Sofia, 1968, p. 76—78.

Novaj vojoj. (Rakonto). Tradukis Asen Simeonov. — En Bulgara prozo, Sofia, 1960, p. 91—101.

Ankaŭ en Nuntempa Bulgario, № 4, 1959, p. 34—38, sub titolo „Reveno en la hejmlandon“.



Fragmento en: Simeonov, Simeon M. Esperanta kristomatio, Sofia, 1968, p. 78—80.

*Al la vivo.* (Rakonto). Tradukis Plebejo (Nik. Aleksiev). — *Balkana Laboristo*, II, № 2, 1929, p. 20—23.

*Ĥoro.* (Rakonto). Tradukis A. Lozanov (At. Lakov). — *Balkana Laboristo*, II, № 7—8, 1930, p. 88—91.

Ankaŭ en: Sarafov, Ivan. Legolibro, 1948.

*Brigadistaj noktoj.* (Fragmento el la libro „La trapasejo de l'junularo“). (Tradukis Stefka Ĥristova). — *Internacia Kulturo*, II, № 11—12, 1947, p. 7—8.

*Antaŭ la portreto.* (Rakonto). Tradukis el bulgara lingvo Dimtr Haĝiev. — *Internacia Kulturo*, III, № 5, 1948, p. 4—5.

*Agla roko.* Rodopa legendo. (Fragmento). Tradukis Steki (Stefan Kiraĝiev). — *Bulgara Esperantisto*, № 5, 1959, p. 11—13.

*Domo kun kolonoj.* (Rakonto). Tradukis Lidia Kuŝovalieva. — *Nuntempa Bulgario*, IV, № 12, 1960, p. 28—31.

#### Publicistiko

*Antaŭparolo.* — En: Smirnenki, Ĥr. Tra la Ventego, Sofia, 1931, p. 3—4; Dua eld., Sofia, 1950, p. 5—7.

*Pli longe inter la homoj de l'popolo — pli proksime al la vivo.* — *Nuntempa Bulgario*, III, № 3, 1960, p. 31—32.

*Bonega armilo.* (Pri la internacia lingvo Esperanto) — *Nuntempa Bulgario*, IV, № 6, 1960, p. 21.

— Ankaŭ en: Sarafov, Ivan kaj Simeon Hesapĉiev. Lernolibro de Esperanto. II, Legolibro. VII eldono, Sofia, 1972, p. 104.

*Akademiano Todor Pavlov — 75-jara.* *Bulgario*, № 2, 1965, p. 10—13.

*Oni ĉesu la kriman agreson en Vjetnamio!* — *Nuntempa Bulgario*, № 10, 1966, p. 13.

Kr. Karucin

## SUBSKRIBO POR LA PACO

de Georgi Karaslavov

Ĉu la tuta mondo ŝanĝiĝis tiel rapide, aŭ nur ĉi tie la homoj impetis al io nova? Jen, ankaŭ en lia domo, en la domo de avo Kosta Dodiĥanev, ne ĉio fariĝis tiel, kiel ĝi devas kaj kiel decas fariĝi?...

Komence, kiam oni fondis la agrikulturan laborkooperativon en la vilaĝo, la maljunulo ne volis eĉ aŭdi pri ĝi. Kionnnn? Doni sian havaĵon? Perdi siajn grenkampojn? Ho, neee! Kun kamplimoj li vivis ĝis nun, kun kamplimoj li volis pasigi la reston de sia vivo... Jam nelonde restis al li vivi — kaj kiam li estos mortinta, oni faru ĉion, kion oni deziras... Tiam, se oni volas, oni eniru ankaŭ la kooperativon.

Duonjaron filoj, bofilinoj kaj nepoj en lia domo malpaciis pro tiu ĉi koo-

perativo... Kaj finfine ankaŭ li mem konsentis. Ne povis elteni kontraŭ la junularo — kaj cedis. „Eh, — diris foje li al si, — ja ili mem laboros — se ili volas, ili aliĝu...“

Sed montriĝis, ke en la kooperativo estas pli bone. Kaj la maljunulo kutimiĝis, ĉar kutimiĝi al io bona ne estas malfacile. Sed de tempo al tempo io skrapis lin interne: tiuj mallertuloj sin trudis al li, ĵetis ili lian havaĵon en la kolektivon, subtrancis lian forton...

Cetere en la kooperativo kaj la ordo estas bona, kaj la regado estas bona, kaj la komando estas bona. Avo Kosta ne povis falsigi la veron — kaj nu-trajo en la domo estis pli abunda, kaj pri mono ili ne havis zorgon, kiel en la pasinteco...



Nur al unu afero avo Kosta ne povis kutimiĝi, nur pri unu afero ne povis rezignacii: li ne povis kutimiĝi al tio, ke la virinoj enmiksiĝis en la virajn aferojn. Enmiksiĝis en la politikon. Kaj tiel enmiksiĝis, ke ili fariĝis pli grandaj politikuloj ol la viroj. Jen, — kiam oni vidis kaj aŭdis, ke virino estru vilaĝon! Sed jen, vidu — Korubkina Toĝa eniris la vilaĝsoveton. La komunumon ŝi administras, la mondon ordigas. Ja oni tute ne povas diri, ke ŝi estas malvirtulino, ho ne — ordema virino ŝi estas, honesta, kaj ĉiuj ŝin estimas. Kaj ne estas iu tre insruita. Ne. Ordinara vilaĝanino, homo de nia speco. Kaj jen — ŝi spertiĝis, eĉ paroladojn faras... Kaj ne nur ŝi. Maria, la filino de boparenco Dimo, estas en la estraro de la konsumkoopervativo. Kina Kavalĝieva estas membro de la ekonomia konsilantaro de la laborkoopervativo. Kaj Temenujka, lia Temenujka, lia bofilino, kiu zorge flegas lin, kiu komplezas al li kiel al infano, ŝin oni elektis en la estraro de la partia organizo. Se oni elektis ŝin — tio signifas, ke oni respektas ŝin. En tio, laŭ la opinio de avo Kosta, estas nenio malbona. La malbono estas, ke ŝi tro malfrue revenas hejmen. En kunsidoj ŝi ĉeestadas. Kunsidas, do, kun fremdaj viroj, kunsidas ĝis malfrua horo, parolas, aranĝas la aferojn, kaj Tenĉo, ŝia edzo — silentas... Restas trankvila kaj tute malzorgas, ke lia edzino, juna kaj bela kiel akvoguto, revenas post noktomezo, marŝas en la mallumo tute sola... Renkontas ŝin Tenĉo, ĝojas pri ŝi kaj nek koleras, nek ĵaluzo mordas lian koron...

Kaj la maljunulo levadis la ŝultrojn: — Novaj tempoj — novaj homoj.

Du el la filoj de avo Kosta loĝis en apartaj domoj, sed en la komura korto. Kaj estis okazoj, ĉe bona vetero, kiam la tuta multnombra idaro de Dodiĥanev kolektiĝis ĉe komuna manĝotablo sub la granda robinio antaŭ la malnova domo. Tiam infanoj kaj plenaĝuloj zumis kiel abelujo. „La

Parlamento de Dodiĥanev“ — ŝercas Ivan, la malplej aĝa filo de avo Kosta.

Kaj kion oni ne pridiskutis ĉe tiu manĝotablo! Kaj la vialaĝaferojn oni traktis, kaj kontraŭ subdistrikta administracio koleris, kaj la laborkoopervativon priklaĉis, kaj la konsumkoopervativon kritikis. Kun la sama certeco ili parolis kaj pri tio, kio okazis, kaj pri tio, kio okazos. Kalkulis kiom da tritiko ili ricevos en tiu ĉi jaro, kaj en la sekvanta, kaj en la postsekvanta.

La maljunulo aŭskultis kaj levis la ŝultrojn. Kiaj homoj aperis, he!... Iam oni konsideris granda peko diri, kiom oni ricevos, se oni ankoraŭ ne ŝutis la grenon en la grenejojn. Kaj nun!... Oni faradis kalkulojn kvin jarojn anticipe. Timis nek dion, nek la diablon... Jen tio embarasis la maljunulon, timiĝis lin.

Avo Kosta tre ŝatis la momenton, kiam oni komencis paroli pri la ekstera politiko. Li kliniĝis antaŭen apogante sin sur la kubutoj, kaj penadis preterlasi eĉ ne unu vorteton. Oni parolis pri ĉiaj ŝtatoj, pri ĉiaj landoj, pri ĉiaj popoloj. Kaj dum lia tempo?... La popolo tiam estis malklera, la tutan vilaĝon eniris nur du-tri ĵurnaloj kaj eĉ ili venis ne ĉiutage. Nun la ĵurnaloj venis ĉiun tagon kaj oni transportis ilin per aŭtomobilo... Sed avo Kosta ne plu bone povis vidi kaj ne povis silabi la ĵurnalojn, kiujn oni ĉiutage portis al lia domo. Tial li klopodis kapti iun el la nepoj, por ke oni legu al li...

Kaj en la ĵurnaloj oni pli kaj pli ofte skribis, ke la anglaj kaj la usonaj regantoj preparas novan militon. La maljunulo estis suferinta en la tranĉeoj kaj sciis, kio estas milito. Li memoris la malbenitan interaliancanan militon de 1913 jaro, en kiun ilin ĵetis la longnaza germano<sup>1</sup>. Ili militis, atakis — kaj

<sup>1</sup> Temas pri la bulgara caro Ferdinand (1887—1918), tre malamata de la popolo, ĉar li ĵetis Bulgarian en du naciajn katastrofojn. — Rim. de la tradukinto.



kial? Antaŭ liaj okuloj falis Nikolaj Patiljanov, obuso disŝiris Ilija Kjuľčev, kiel garbo estis faligita Toŝko Dinov, malantaŭ pikdrata reto falis kaj ne plu levigis Slav Bliznakov... Dum la unua mondmilito avo Kosta estis en la 55-a regimento. Kiom multe da homoj pereis ankaŭ tiam! Nur ĉe Ĉervena Stena<sup>2</sup> kiom da kadavroj kovris la teron!... Avo Kosta memoris, kvazaŭ tio okazis hodiaŭ, kiel li gluiĝis al la tero en obusa kavo, kaj kiel dum la terura pafkrakado iu nukofrapis lin. Li ankaŭ nun ekstremaĉis, rememorante la deŝiritan hombrakon kun elstarantaj tendenoj, kiu estis frapinta lin... Tie pereis Kosta Ŝinderov, pereis ankaŭ Dimo Maznevski, kaj Vanĉo Poptilev, kaj Todor Katadenov... Tie esis vunditaj ankaŭ Tonĉo Ĝinin, Stefan Tomov, Jordan la Pego, Stojĉo Adamov.

Avo Kosta bone memoris la pezajn marŝojn, la terurajn frostojn, la malsaton kaj la mankon de vestoj, la milittribunalojn kaj la pafekzekutojn, la cenzuron kaj la minacojn de la superaj estroj... Kaj kial tiu ĉi tuta ruinigo?... Nur nun la maljunulo komprenis el la vortoj de la junuloj kaj el la gazetaro, ke ĉio ĉi estis por ke la grandriĉuloj plenigu siajn poŝojn... La rusaj bolŝevistoj malordigis la kalkulojn de tiuj riĉuloj, tial la anglaj kaj usonaj regantoj denove levis la kornojn. Nu bone, la bovo kornofosas, sed la fositaĵo sur lian propran dorson falas...

Do, tiuj riĉuloj, la anglaj kaj la usonaj, ne ŝatas ankaŭ nian sociordon. Kelkloke avo Kosta interrompis la legadon de la nepo.

— Ha, ĉu ni ilin invitas per „balklica“? — demandis li kolere. — Ili ja sidu en sia lando... Vidu nur ilin, la rabistojn! Eble ankaŭ al mi ne plaĉas

la najbaro, sed li sidas en sia domo, kaj mi sidas en la mia. Kaj mi ne rajtas miksiĝi en liajn aferojn...

... La maljunulo sciis, ke ne estas normala homo en la mondo, kiu volus militon. Ankaŭ dum aliaj militoj la ordinaraj homoj ne volis morti. Sed kiel la popoloj diru, ke ili ne volas militon? Kiel ili kolektiĝu kune kaj ekkriu per unu voĉo, por ke la tuta mondo aŭdu? Ĉu oni povas kunvenigi tiom multe da popoloj el tiom da landoj kaj demandi ilin en unu lingvo, kiun ĉiuj povus kompreni: „He vi, homoj, diru, ĉu vi volas militon?“

Ne eblas — pensis avo Kosta. Jen tiun aferon ne estas ebla fari. Sed.. povas esti, ke ekzistas iu rimedo; sed kiamaniere ĝin ekscii... Temenuĵka rakontis, ke en Eŭropo okazis kongresoj por paco. En tiuj kongresoj kunvenis homoj el la tuta mondo. Kaj tie oni decidis batali kontraŭ la milito. Nu, bone, sed kiom povas esti tiuj homoj? Ili estu mil, estu du mil. Eĉ dek mil ili estu. Ili ne povas atingi rezultojn. Kio estas dek mil — du regimentoj da homoj! Estas necese, ke ĉiuj, ĉiuj ĝis la lasta homo diru sian parolon. Kaj tiam oni vidu, kiel tiuj, kiuj planas novan militon, ektimos...

En la ĵurnalo oni skribis, ke okazis nova kongreso por la paco. En kiu lando — la maljunulo ne memoris, ie malproksime, trans maro. Kolektiĝis sciencistoj kaj simplaj homoj el ĉiuj landoj de la terglobo kaj decidis disvastigi folion — kiu volas pacon, li subskribu tiun ĉi folion.

Avo Kosta ne komprenis: kiel devus aspekti tiu ĉi folio, kiun povus subskribi ĉiuj homoj en la mondo... Ja ĝi devus esti kiel la granda grenkampo de la kooperativo — hee, verŝajne ĝia fino ne estas videbla...

Ne, ankaŭ tiel ne estos eble.

Dimanĉe matene pluvetis kviete-kviete, kaj avo Kosta sin kaŝis je seka loko sub la remizo kaj malnajlis malno-

<sup>2</sup> Ĉervena Stena — loko en Makedonio, kie okazis granda batalo inter la bulgara armeo kaj la armeoj de la Entento dum la Unua Mondmilito. — Rim. de la trad.

<sup>3</sup> Balklica — plata lignobotelo por vino.



van trogon. Li estis promesinta al la nepoj fari al ili veturileton. La infanoj ĉirkaŭadis lin kaj konstante demandis, kiam la veturileto estos preta...

La hundo el sub la remizo de la malnova domo ekbojis malvigle kaj silentigis.

— Kiu estas? — demandis la maljunulo ne levante la kapon.

La infanoj ekrigardis al la stratpordo.

— Fratinjo Temenujka, — diris iu el ili, kaj alia aldonis: — Kaj kun ŝi estas onklino Mitra Bobotankina kaj onklo Delĉo Krivostojov.

En la vastan Dodiĥanev-korton oni konstante venadis kaj eliris, tial avo Kosta eĉ ne ekrigardis por vidi la novajn gastojn.

Temenujka kaj la gastoj iris supren al la malnova domo, sed poste reiris kaj venis al la remizo. La maljunulo lasis la tenajlon kaj scivole palpebrumis al ili. Li miris, kial do ili venas tien ĉi.

— Bonan venon, bonan venon! — manpremis ilin avo Kosta. — Kion vi portas? Bonon aŭ malbonon?

— Por bono ni venas, por bono, — diris Delĉo

— Ni estas komisiono, avo, — aldonis Temenujka.

— Komisiono? Kia komisiono?

— Ni kolektas subskribojn por la paco, — klarigis Temenujka.

La maljunulo ekmiris. Haaa! Vidu nur! Do — jen estas ĝi! Kaj kie sur la folion oni metos sian subskribon? Kie estas la granda folio mem? Li ekrigardis la junajn homojn. Ja li estas maljuna, kial do ili bezonas lin, kial ili devojiĝas ankaŭ ĉe li? Eble ili demandas lin pri io ajn?

— Nu, avĉjo, subskribu vi la unua, kaj poste ĉiuj ceteraj en nia hejmo, — diris la energia kaj nelacigebla Temenujka.

La maljunulo glutis emociite.

— Sed — ĉu ankaŭ mi? — demandis li por forigi la densan humidon,

kiu plenigis liajn okulojn. — Mi ja estas maljuna, infano mia.

— Ĉiuj — kaj grandaĝaj, kaj junaj, ĉiuj ĝis la lasta homo subskribos, — klarigis Delĉo serioze, kiel en kunveno. — Por ke oni sciu, ke la bulgara popolo estas kontraŭ la milito.

— Sed... ĉu ĝi estas por ĉiuj? — ne povis kompreni bone la maljunulo.

— Por ĉiuj, — jesis Mitra.

— Por tuta Bulgario? — ankoraŭ ne povis orientiĝi la maljunulo.

— Ne nur por tuta Bulgario, sed ankaŭ por la tua mondo! — emfazis Temenujka.

— Kaj kion... kion subskribos tiom multe da homoj? — demandis finfine la maljunulo. Kaj ekrigardis al Mitra, kiu portis subbrake grandan grizan paperujon.

Temenujka prenis lerte la paperujon kaj malfermis ĝin.

— Jen, avo mia, jen! — ŝi montris ordinarajn foliojn. — Ĉi tie oni skribas, ke tiuj folioj estas senditaj de la Monda Komitato por Defendo de la Paco. Jen, ĉe la fino oni diras: „Ni invitas ĉiujn homojn kun bona volo el la tuta mondo subskribi tiun alvokon.“ Kun bona volo — do, libervole. Tiaj folioj estas milionoj. Ili estas dissenditaj en la tuta mondo. Poste oni kolektos ilin en unu loko por ke oni vidu, kiom da homoj ne volas militon, kaj kiom da homoj ĝin volas...

La maljunulo finfine komprenis... Liaj okuloj rondiĝis, kaj la vizaĝo heliĝis...

— Ahaaa, — li skuis sian maljunan kapon kaj apenaŭ perceptebla rideto de kontentiĝo fleksis la randojn de lia lipoj. — Saĝaj homoj, kleraj homoj ĝin arangis. Tia do estas la afero, — diris li kvazaŭ al si. — Nu donu, ke ankaŭ mi... Sed ĉu mi povos, ha?

Oni metis oportune la paperujon sur la trogon antaŭ la maljunulo. Li rigardis iel mirigite, emociita kaj embarasita. Antaŭ liaj okuloj ekdancis la subskriboj, metitaj sur la unuan duonon



de la folio. Sed la maljunulo forgesis, ke ili estas subskriboj de liaj najbaroj, de liaj proksimuloj, de parencoj kaj amikoj, de junaj kaj maljunaj... Ek-sajnis al li, ke tio estas subskriboj de malproksimaj homoj, el nekonataj landoj. Ĉu nekonataj? Ne, ili ne estas nekonataj. Ja li vidis sur la fronto en la unua mondmilito kaj negrojn, kaj francojn, kaj anglojn, kaj italojn, kaj grekojn, kaj serbojn, kaj montenegranojn... Kaj jen do: kun tiuj homoj, kontraŭ kiuj oni iam sendis lin militi, nun li subskribas la saman folion por la paco... Ili estas ordinaraĵ kaj labo-

rantaj homoj, kun ili li ne havas kion dividi kaj pro kio kvereli. Kun tiuj milionoj da homoj el ĉiuj anguloj de la tero, de ĉiuj koloroj kaj religioj ankaŭ avo Kosta metas sian subskribon sur saman folion...

La mano de la maljunulo tremis. Li eligis el sub sia zono bluan hejme faritan tukon, viŝis siajn okulojn kaj kunpremiz la krajonon inter siaj kre-vintaj fingroj...

*El la bulgara (kun mallongigoj):*

*Kunĉo Vălev*

### Lige kun la 75-jariĝo de la aŭtoro

## NEATENDITA VIZITO

*de Ivan Draganov*

*Dediĉita al mia filo Bojidar*

Ankaŭ tiun ĉi matenon avo Lujbo vekigis tre frue. Ekstere ankoraŭ regis mallumo. Li emis kuŝi en la lito ar-

mencis skribi en kajero siajn rememorojn, kolektitajn kaj amasigitajn dum pli ol kvardek jaroj. Iam, en la pasinteco, li estis instruisto en diversaj vilaĝoj, kaj en la lastaj kelkaj jaroj — en urbo X.

2 Kiel sur filma bendo lia vivo denove aperis antaŭ liaj okuloj.

Jen estas la bildo, kiam li unuafoje estigis instruisto en vilaĝo T. Dum la unua instruaro, ankoraŭ estante ne tiom sperta, li devis instrui al kvar klasoj! Meze de la jaro oni enoficigis ankaŭ alian instruiston. Ili ambaŭ rapide amikigis kaj volonte helpis unu la alian. La maloportunaĵoj abundis, tamen ili ne sentis tion — ja la juneco kaj la kredo je la brila estonteco venkas ĉiujn obstaklojn! De post tiu tempo pasis kelkaj jaroj preskaŭ nerimarkite. Kaj jen li jam estas instruisto en urbo X. Tie oni elektis lin kiel membron de la gvidantaro de la loka instruista grupo. Venis 1923 — jaro de la popola ribelo. Pro siaj progresemaj konceptoj li estis arestita. Post lia liberigo, li ree estigis instruisto en vilaĝo. Tiel pasis multaj jaroj. Kaj jen venis la sortodecida Naŭa de Septem-



koraŭ iom da tempo en la matenkrepusko. Estis aprilo — la noktoj sufiĉe mallongigis. Avo Ljuben ellitigis, vestis sin malrapide, ordigis la ĉambron kaj eksidis ĉe la skribotablo. Li ko-



bro 1944. Denove li estas instruisto en urbo X. Oni proponis al li alian oficon, sed li ne akceptis — ne povis rezigni sian noblan kaj ŝatatan profesion kaj preferis resti kun la infanoj.

Iom laciĝinte, li ĉesis skribi, ekstaris de sur la seĝo kaj komencis promeni en la ĉambro. Sur la muroj pendis portretoj el lia vivo kiel instruisto. Jen tiu ĉi el la tempo de lia lasta instruista jaro — sur la foto li staras meze de siaj lernantoj de la IV-a klaso. Sur la unua vico estas Penka. Li ankoraŭ memoras sian nomon. La plej bona kaj plej diligenta lernantino. Ĉe ŝi — Dobri. Viciĝintaj unu apud la alia — Angel, Mitju, Olja kaj aliaj, kaj aliaj. Ĉiuj mildaj, amindaj, ĉiuj kun ridetantaj vizaĝoj. Kiu scias, kie ili estas nun kaj pri kio sin okupas! De tiu tempo forflugis jam pli ol 20 jaroj.

Jen estas alia foto — li ofte ŝatis fiksi sian rigardon al ĝi — tie troviĝis surskribo: „Studrondo de lernantoj-esperantistoj“, kaj meze de ĝi — li, avo Ljubo. Ankaŭ tie la samaj vizaĝoj de Penka, Olja, Dobri, Angel kaj aliaj. La plej kapablaj, la plej distingitaj en la studado, liaj plej amataj lernantoj. Kaj kiom multe ili ĝojis tiutempe, kiam ili ricevis el fremdlando respondon al sia unua letero, skribita en Esperanto, kiu finiĝis per la vortoj: „Surtere eterna paco!“ Observante la fotojn, en la okuloj de avo Ljubo komencis perli larmoj de emocio.

Subite iu malfermis la pordon kaj tio interrompis liajn pensojn. Eniris lia kara nepo, la malgranda Ljubo.

Kaj jam de la sojlo li komencis krii:

— Avo Ljubo, vi ja promesis rakonti al mi denove tiun fabelon!

— Kiun?

— Pri la saĝulo, kiu povis kompreni la lingvojn de birdoj kaj de floroj. La saĝulo kun la blanka hararo kaj kun longa barbo.

— Bone, Ljubo, sed ĉu vi promesas esti ĉiam obeema?

— Jes, avo mia!

Kaj avo Ljuben komencis rakonti la mirindan fabelon.

... En malproksima lando fama saĝulo laŭkute fadis siajn ĉiumatenojn promenadojn en la granda parko apud la urbo, kie li loĝis. La multnombraj jaroj jam delonge argentis lian longan krispan hararon. La tempo per sia ĉizilo faltis al li la vizaĝon. Sed malgraŭ la ŝarĝo de siaj multaj jaroj li marŝis vigle kaj energie, kun rekta korpo, kaj sur lia vizaĝo ĉiam floris bonanima rideto. Vestita en blanka togo, la piedoj — en sandaloj, li paŝis laŭ la strato al la parko. La frue elitiĝintaj infanoj kantante venis renkonte al li. Li karegis iliajn taŭzitajn hararojn, ĝojrigardantaj vizaĝojn, kaj ili ĉiam akompanis lin ĝis la enirejo de la parko. Estante ilia bona amiko, li tre ofte rakontis al ili mirindajn fabelojn.

Li estis ankaŭ amiko de la floroj kaj la birdoj. Pri li oni disvastigis la famon, ke li komprenas iliajn lingvojn.

Kiam li promenis tra la parko, la floroj gracie balancis kaj klinis siajn korolojn, bonvenigante sian amikon, kaj la birdoj per sia matena koncerto salutis la faman saĝulon, kiu komprenis la sencon de iliaj kantoj. Iuj el ili surflugis liajn ŝultrojn aŭ manojn, kaj li karegis ilin kaj rigardis ilin amoplene per siaj mildaj kaj ridetantaj bluaj okuloj.

Iun matenon en majo li eniris la parkon tre frue. La sunapero trafis lin sidanta ĉe rozarbusto, sur kiu unu el la najtingaloj ĵus estis komencinta sian frumatenan kantsaluton al la aperanta suno.

En sa sama momento la najtingalo per siaj gajaj triloj vekis la tri dormantajn rozojn. Ili etendis kapetojn, malfermis okulojn kaj ekridetis unu al la alia.

— Ho, bonan matenon, miaj karegaj fratinetoj! — diris la unua rozo.

Ĉu vi scias, kian mirindan sonĝon mi havis? Mi sonĝis, ke...

Subite en tiu momento iu sonorigis. Avo Ljubo levigis de la seĝo por malfermi la pordon. Antaŭ li aperis du junuloj kaj unu junulino, aŭfable ride-tantaj al li. Tamen li tute ne povis rekonii ilin. Invitante ilin eniri la ĉambron, li fiksis okulojn al la gastoj kaj penis diveni, kiuj ili estas. Subite li rekonis ilin. Jes... tio estas ja liaj amataj iamaj lernantoj — Penka, Dobri kaj Angel. Pro emocio en liaj okuloj aperis larmoj. Neatendita kaj ĝoja renkonto. Penka nun estas kuracistino, Angel kaj Dobri — inĝenieroj. Sur la refaldo de ĉiu el iliaj jakoj brilis or-deno de profesia honordistingo, kaj kune kun ĝi modeste montriĝis la verda steleto... Tio pligrandigis lian gojon. Ĉiuj tri rakontis, ke ili hazarde renkontiĝis en la ĉefurbo, ekscitis pri sia iama instruisto, kaj decidis nepre viziti lin kune.

Ili prezentis al li donacon kaj ĉarman bukedon el vivaj floroj. Ja hodiaŭ estas la 3-a de aprilo — lia naskiĝtago, en kiu li ĉiam invitis la tu-

tan klason gasti ĉe li. Li kutimis regali ilin per bombonoj kaj aliaj frandaĵoj. Poste rakontis al ili longe, longe, kaj fine diris, ke atendas ilin brila estonte-co. Kaj evidentigis, ke li pravis, ke tio ne estis nur liaj revoj. Jen, hodiaŭ ili estas kuracistoj, inĝenieroj... Ili ne povis forgesi la bonan, amatan instruiston kaj lian naskiĝtagon.

Nur tiam avo Ljubo komprenis... Li haltis denove ĉe la skribotablo, ĵetis rigardon al la kalendaro, kiu grave indikis: la 3-an de aprilo. Vere, hodiaŭ estas lia naskiĝtago. Absorbite per skribado de siaj rememoroj, avo Ljubo estis forgesinta tion.

Profunde kortuŝita, li dankis al siaj gastoj, kiuj tiel agrable surprizis lin, kaj invitis ilin tagmanĝi kune kun li. Post la tagmanĝo, pasinta en gaja at-mosfero, la tri vizitantoj adiaŭis lin emociite. Kiam ili foriris, avo Ljubo sidigis ĉe la skribotablo kaj per tre-metanta mano notis en sia taglibro:

— Tiun ĉi jaron mi festis plej so-lene la 75-an datrevenon de mia naskiĝo kune kun miaj amataj ekslernan-toj — miaj neforgeseblaj gekursanoj.

## *El nia socialisma patrolando*

### *LA UNUA ATOMSUNO SUR LA BALKANA DUONINSULO*

Tie, kie sur la Danuba bordo iam elsiĝis kun sia taĉmento la legenda revoluciulo kaj poeto de Bulgario Hristo Botev, hodiaŭ leviĝas la altega korpo de la unua atomsuno sur la Balkana Duoninsulo — la Atoma Elektrocentraro.

Nun ĉi tie bolas febra laboro. La konstruado eniris sian decidan fazon, ĉar nur post kelkaj monatoj la unua parto de la centraro (440 megavatojn) ekfunkcios. Tio signifas, ke unuafoje ĉe ni kurento, produktita de atoma re-aktoro, ekfluos laŭ la elektraj vejnoj de nia patrolando por porti lumon kaj bonstaton al ĉiuj.

En senpera proksimeco de la rapide

konstruata unua bloko de la Atomcen-tralo en Kozloduj ekde la pasinta jaro komenciĝis intensa konstruado ankaŭ de la dua atomcentraro, kies projekto egalas la unuan. Ambaŭ centraroj kune havas forton de 880 megavatoj. Tio signi-fas, ke post kelkaj jaroj, kiam la Atomcentraro apud Kozloduj estos tute preta, ĝi ekstaros kiel unu el la plej potencaj energetikaj objektoj de Bul-gario, kiu ĉiujare produktos elektran energion de 12 miliardoj da kilovat-horoj.

Apenaŭ oni povus kompari nuntem-pan socialisman Bulgarijon kun ĝiaj energetikaj fortoj kun Bulgario de la pasinteco, Bulgario de la kapitalismo.



Ĝis 1944 j. ĝi havis entute 117 malgrandajn elektrocentralojn, kies komuna forto ne superis 110 megavatojn kun komuna produktado de elektroenergio de 311 milionoj da kilovathoroj... (En 1973 j. Bulgario produktis 22 miliardojn da kilovathoroj).

Sed krom la Atomacentralo apud Kozloduj en Bulgario estos konstruitaj ankoraŭ du atomelektrocentraloj kun forto de 2000 megavatoj kaj 4000 megavatoj. La efektiviĝo de la programo pri disvolviĝo de la atoma energetiko de Bulgario donos en 1990-a jaro eblecon al la centraloj kun nuklea brulmaterialo produkti ĉirkaŭ 40% el la elektroenergio de la lando kaj en 2000-a jaro — ĉ. 65%.

La elektrifikado de Bulgario daŭros per rapidaj ritmoj. Hodiaŭ Bulgario es-

tas lando kun alte evoluinta industrio. En ĝi la konsumo de elektroenergio laŭkape de la loĝantaro superas grave la najbarajn landojn kaj egalas al multaj eŭropaj landoj. En 1975 j. la konsumo de elektroenergio atingos 31 miliardojn da kilovathoroj kaj ĉ. 1990 j. — 100 miliardojn da kilovathoroj. Paralele kreskos ankaŭ la konsumado de elektroenergio laŭkape de la loĝantaro: de 3800 kilovathoroj en 1975 j. al 10 000 kilovathoroj en 1990 j. Tiamaniere Bulgario atingos la nivelon de multaj landoj en la mondo, tre progresintaj en ekonomia rilato.

Sian gravan kontribuon por la elektrifikado de socialisma Bulgario donos ankaŭ la unua atomsuno sur la Balkana Duoninsulo — La AEC apud Kozloduj.

*Haim Levi*

## ORGANIZA VIVO

## SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO

Dum SIA la bulgaraj esperantistoj multloke organizis publikajn kunvenojn kaj letervesperojn, preparis multajn vidajn propagandilojn — vitrinojn, murgazetojn, ekspoziciojn k. a.

## VESPERO DE LA ESPERANTO-VERKARO

En la ĉefurbo Sofio jam estas tradicio dum la Semajno de Internacia Amikeco organizi en la Sofia Universitato Vesperon de la E-Verkaro.

Ĉi-jare la Vespero okazis la 22-an de februaro. Ĝin malfermis per konciza parolado pri la ideo de la Semajno k-do Kunĉo Vălev — lektoro de Esperanto en la Universitato kaj prezidanto de la Sofia Instruista E-Societo „Diĉo Petrov“.

Antaŭ la publiko prezentigis niaj verkemaj gesamideanoj kaj tra legis siajn originalajn aŭ tradukitajn verkojn en Esperanton.

Legis persone originalan rakonton Ljuba Bojaĝieva („Henk“) kaj Dimitr Borisov („Tio restu inter ni“) — humuraĵo. Originalan poezion legis Penka Batoeva („Atendado“) kaj Marin Băcev („Printempo“). Siajn tradukojn legis: Simeon Ĉirpanliev (la versajon „Balado pri tri fratoj“ de N. Ĥrelkov) kaj Stefan Ki-

raĝiev („Uzino“ de N. Vapcarov).

Estis ankaŭ recitaĵoj de E-verkoj. Poezio: Vera Vajarova („Alloga lumo“ de Stojan Kostadinov kaj „La dumila jaro“ de Nevena Nedelĉeva), Branimir Vălev — lernanto („Pasera Kanto“ de L. Bojaĝieva) kaj Kremona Băceva — lernantino („Krianta silento“ de L. Bojaĝieva). Kunĉo Vălev tra legis rakonton de Prodan Prodanov („Blanka nokto“), d-ro Stefan Kadiev — la prozajon „Protekto“ de Ĥ. Emil Koralov (traduko de Ivan Kuŝoaliev) kaj Morjana Văleva — la versajon „La Kolombo de Picasso“ de Aleksandr Muratov (traduko de Asen Grigorov).

La Vespero de la Esperanto-Verkaro estis bona manifestado de niaj talentuloj kaj samtempe — manifestado de nia volo vivi en paco kaj paca kreado.

*M. Conkovski*



## PER ESPERANTO TRA LA MONDO

„Per Esperanto tra la mondo“ estas la moto de la bilda ekspozicio, malfermita en decembro 1973 en Veliko Târnovo. La bildoj, 58 laŭnombre, estas pentritaj de nia samideano Prodan Prodanov. Ili prezentas pejzaĝojn el USSR, Francio, Svislando, Ĉeĥoslovakio, Pollando, Jugoslavio kaj Bulgario. La bildoj estas rezulto de racia utiligo de la tempo, kaj la aŭtoro faris ilin laŭ skizoj dum sia veturado en la menciitaj landoj. La tekniko de la aŭtoro estas varia: oleofarba, akvofarba, litografia, monotipia, linogravura kaj tuŝo. La salono „Orbita“, kie estis aranĝita la ekspozicio, ebligis eniron de sufiĉa nombro da vizitantoj, kies opinioj estas spegultaj en la porimpresa kajero. La opinioj estas favoraj kaj atestas, ke la ekspozicio plaĉas al la vizitantoj. Plej entuziasmaj estas la enskriboj de la studentoj.

La ekspozicio estis aktive helpata de la samideanoj el V. Târnovo, kaploke de k-do Hristo Dolčinkov.

La sama ekspozicio estis malfermita en urbo Polski Trâmbeŝ en la tagoj de la Semajno de Internacia Amikeco sub la protekto de la Urba Konsilantaro de Belatro kaj Scienco, de la Urba Kulturdomo, de la Urba Packomitato, de la urbaj komitatoj de Komsomolo kaj Sindikatoj, de la E-Societo kaj la aliaj amasaj organizaĵoj. Ĉe la malfermo ĉeestis esperantistoj, neesperantistoj, gimnazianoj kaj aliaj gejunuloj. K-do Prodanov prelegis bulgarlingve je temo: „La mondo tra la rigardo de la pentristo“. La prelego substrekis la signifon de Esperanto por la patriotisma kaj internaciisma edukado de la junaj generacioj, la progresivan karakteron de la bulgara E-movado, la mondan pachtatalon kaj la propagandon de la bulgara kulturo en eksterlando. Ĝenerale la vespero de la ekspozicia malfermo aliformiĝis en negrandan spontanegan feston de la internacia amikeco.

Granda estis la kontribuo de s-ano Hristo Manolov, kiu jam havas sperton pri organizado de ekspozicioj, ligitaj kun Esperanto. Pro la intereso de la publiko la ekspozicio en Polski Trâmbeŝ daŭris ankaŭ post la fiksita limtempo.

La ekspozicio estas efika propagandilo de la Internacia Ling-

vo kaj montras la belecon de iuj eŭropaj landoj, inkluzive nian patrolandon.

## ESPERANTO EN RADIO SOFIA

Antaŭ nelonge Radio Sofia en la kadro de la Prijunlara Disaŭdigo „La tago estas plena de beleco“ emisiiis intervjuno kun nia konata esperantisto-kanzonisto Miŝo Zdravec. Demandojn faris la redaktorino Paŝa Stojčeva. La artisto havis eblecon rakonti koncize pri siaj sukcesplenaj koncertoj antaŭ esperantista publiko en Vieno, Kopenhago, Londono, Beogrado, Varsovio. Dum la intervjuo li kaptis la okazon ankaŭ por informi pri la Internacia lingvo kaj la Esperanto-movado.

La disaŭdigo havis konsiderindan reeĥon. En la Junulara Redakcio de Radio Sofia oni ricevis multe da leteroj pri la Esperantaj kanzonoj kaj p ri la lingvo mem.

## NOVAJ KURSOJ


Ruse. Malfermita E-kurso en la Profesia Konstruista Lernejo. Partoprenis ne nur lernantoj, sed ankaŭ kelkaj instruistoj. Kursgvidanto — Stefan Grânčarov, ekslerneja inspektoro, sperta pedagogo.

Sofio. La Esperantista Sekcio „Justeco“ de l' Asocio de la Juristoj en Bulgario malfermis tri novajn kursojn — du por komencantoj kaj unu por progresintoj. La kursojn por komencantoj gvidas Marin Bacev kaj Violin Oljanov, la kurson por progresintoj — Kunčo Vălev. Partoprenas entute 73 kursanoj.

## CELEBRO DE LA VIRINTAGO

La sofiaj esperantistoj organizis tuturban solenan kunvenon okaze de la Internacia Tago de la Virino — la 8-a de marto. La aktorino de la Bulgara E-Teatro Belka Beleva malfermis la kunvenon per varmaj vortoj. La veterano de la bulgara E-movado kaj membro de CK de BEA Trajana Petkova rakontis rememorojn pri la partopreno de la bulgaraj virinoj en la kontraŭfaŝisma batalo. Antaŭ la emociita publiko elkreskis la figuroj de multaj popularaj heroinoj, inter kiuj ankaŭ esperantistinoj.

La E-poetino Ljuba Bojaĝieva legis sian novan poemon, dediĉitan al la bulgarinobatalantino por popola liberigo el la otomana jngo. La verko de la poetino elvokis spontanajn aplaŭdojn. La aktorino de BET Kostadinka Nedeva kreis gajan humoron per plenumo de humuraĵoj. La prezidanto de la Sofia DK de BEA G. Dolapčiev en sia salutparolo esprimis estimon kaj rekonon al la abnegacia agado de la sofiaj esperantistinoj, kiuj estas pli ol la duono de la organizitaj geesperantistoj en la ĉefurbo.



на Изпълнителното бюро на Централния съвет на Съюза на българските филателисти и Бюрото на Централния комитет на Българския есперантски съюз

Изпълнителното бюро на Централния съвет на Съюза на българските филателисти и Бюрото на Централния комитет на Българския есперантски съюз, като се ръководят от общите си цели и задачи да работят за комунистическото възпитание на трудещите се и за осмисляне на културния им отдих, и провеждайки своята дейност в съответствие с решенията на X конгрес и Програмата на Партията за изграждане на развито социалистическо общество,

### РЕШИХА

1. Филателните дружества съвместно с есперантските дружества да разгърнат широка дейност по популяризирането на филателията и езика есперанто.

За разясняване задачите и целите на филателното и есперантското движение да се провеждат лекции, беседи, прожекции на филми, викторини, конкурси и др.

За лектори да се привличат филателисти-есперантисти.

2. Централният съвет на Съюза на българските филателисти и Централният комитет на Българския есперантски съюз и техните дружества периодично да организират съвместни филателни изложби с цел да популяризират колекционирането на пощенски марки на тема „Есперанто“.

3. С цел да се координира съвместната

*За ЦС на Съюза на българските филателисти*  
председател: проф. инж. Ст. Христов

дейност препоръчва се по възможност в съставите на окръжните съвети на Съюза на българските филателисти и в управителните съвети на филателните дружества да бъдат включват представители на ръководствата на местните есперантски дружества.

Учреденият в София клуб на филателисти-е-сперантисти, чиято дейност се ръководи от Българския есперантски съюз, да поддържа най-тесни връзки със Съюза на българските филателисти. Клубът да обединява филателистите-есперантисти от цялата страна.

Органите на Съюза на българските филателисти и Българския есперантски съюз — сп. „Филателен преглед“ и сп. „Булгара есперантисто“ — да съдействуват най-активно за подобряване на съвместната работа между двете организации, като периодично публикуват материали за тази дейност.

5. Ръководните органи на двете организации по места, в духа на настоящето решение, да приемат свои конкретни мероприятия за съвместна дейност и периодически да вземат допълнителни мерки за нейното подобряване.

ЦС на Съюза на българските филателисти и ЦК на Българския есперантски съюз изразяват увереност, че настоящето решение ще допринесе за подобряването на цялостната филателна и есперантска дейност и ще укрепни сътрудничеството между двете организации.

*За ЦК на Българския есперантски съюз*  
председател: Н. Алексиев

## Juna esperantisto

### LA OKA NACIA JUNULARA ESPERANTISTA KONFERENCO

Svištov — blanka kolombo, sidiginta sur la bordo de Danubo. Svištov — la urbo, kiu la unua renkontis la rusajn fratojn portantojn de nia liberiĝo el la 500-jara nigra otomana jugo. La urbo de Aleko ...

En tiu malgranda urbo kun heroa pasinteco kaj lumplena estonteco je la 16 kaj 17 de marto okazis la Oka Junulara Esperantista Konferenco.

Ĉe la stacidomo granda slogano kun varmaj vortoj: „Bonan venon, karaj geamikoj“, kaj riedetantaj mienoj de svištovaj esperantistoj renkontis la partoprenintojn en la Konferenco.

Iuj ludigis por la unua fojo, aliaj renkon-

tiĝis post longa disiĝo — tamen ĉiuj man premis kaj ĉirkaŭbrakis sincere unu la alian, ĉar nobla celo vigligas ĉies korojn ...

Unue ni vizitis la monteton de la blankaj obeliskoj — loko, kie la rusaj soldatoj trapasis Danubon. Ni prezentis florkronon kaj klinis la kapojn dum unuminuta silento antaŭ la herooj de la soldatoj, restintaj por eterne sur

Salutas k-dino M. Marčeva





tiu ĉi bordo.

Niaj amikoj esperantistoj el Sviŝtov konigis al ni la historion de la antikva urbo Nove. Oni rakontis ankaŭ pri la unua bulgara legejo, malfermita en 1856 j. Ni vizitis faman preĝejon kun moviĝantaj kolonoj, konstruitan en la pasinta jarcento de la oraj manoj de majstro Koljo Fiĉeto. Kun tremo ni trapasis la sojlon de la granda domo de la plej honesta el ĉiuj bulgaraj verkistoj — Aleko Konstantinov.

Vespere en la junulara klubo „Ŝtastliveca“ (La Feliĉulo) okazis varia programo, muziko, dancoj, tombolo, konkursoj pri plej bele dancanta paro ktp., ĉio ĉi saturita per sufiĉaj dozoj da rido kaj ŝercoj.

La 17-an je la 9,30 en la bele ornamita klubo de la Urba Popola Soveto estis solene malfermita la Konferenco mem. K-dino Mara Marĉeva — reprezentanto de la Urba Komitato de la Bulgara Komunista Partio en urbo Sviŝtov, kore salutis la junajn esperantistojn, bondezirante al ili sukcesan laboron por efektiviĝo de la noblaj esperantistaj ideoj pri amikeco inter la popoloj, pri paco en la tuta mondo. K-dino Krăstina Vasileva — longjara prezidantino de la urba E-societo, bonvenigis la junularon kaj esprimis sian neŝanceleblan konvinkon en la hela estonto de Esperanto. La sekretario de BEA Stojan Kostadinov parolis pri la plej gravaj problemoj, kiuj nun staras antaŭ la esperantista junularo. Ili unua celo estas fortikigi la amikajn ligojn kun la esperantistoj de ĉiuj landoj, konatigi al ili nian socialisman patrolandon, la novan vivon de nia popolo.

Profesoro Ĥristo Marinov el la Supera Ekonomia Instituto en la urbo, longjara esperantisto, bonvenigis la junularon kaj la studentojn-esperantistojn en la nomo de la rektoro Minko Rusinov — ankaŭ esperantisto, kaj en sia nomo.



La partoprenantoj en la Konferenco aŭskultis la raportojn de Katja Likova el Sviŝtov kaj de Antonija Spasova el Ĥaskovo pri la aktivecoj de iliaj E-societoj dum la jubilea jaro de nia liberigo el la faŝista jugo.

Salutojn al la Konferenco prezentis ankaŭ la prezidanto de la DK de BEA en Veliko Tŕrnovo Ĥristo Dolĉinkov, Angel Todorov — sekretario de BEA, Cenka Ivanova — de la esperantista junularo de Sviŝtov kaj Nedelĉo Stefano — prezidanto de la E-junularo en Ŝumen.

Fine s-ano Dimitr Murgin tralegis saluttelegramon al CK de BEA.

*Georgi Mihalkov*

### **„PACO“ — NOVA SERIO**

Laŭ decido de la 6-a Konferenco de MEM en Beograd lastsomere, ekde 1974 jaro la organo de MEM „Paco“ estas eldonata en Bulgario. Ĉi aperados 6-foje en la jaro en amplekso de 16 grandformataj paĝoj.

La abonantoj el la diversaj landoj jam posedas la 1-an numeron kaj iuj el ili esprimas sian kontentecon, trovante la revuon tre plaĉinda.

Antaŭ ĉio bonan imperson faras ĝia arta aranĝo. La revuo estas presita sur glacea papero. Ĝi estas riĉenhava, kun diversaj rubrikoj, multaj kliŝoj. Eĉ de la unua rigardo oni konstatas, ke la titolo „Paco“ tre bone reliefigas, presita sur la tuta larĝo de la unua paĝo. Sur la unua paĝo estas ankaŭ la fama skulptaĵo de Evĝenij Vuĉetiĉ „El la glavono forĝu plugilon“.

En la enhavo troviĝas: ĉefartikolo „Al la popolo — pacon kaj sekurecon!“, Unuigita Deklaro, subskribita de Romeŝ Ĉandra — ĝenerala sekretario de la Tutmonda Packonsilantaro, kaj N. Aleksiev — prezidanto de MEM — pri uzado de la internacia lingvo Esperanto por plifirmigo de la internaciaj rilatoj en la pacbatalo; Alvoko de la Tutmonda Kongreso de la Pacamaj Fortoj; Trijara konspiro kontraŭ Ĉilio; la rakonto „Fremda Maro“; fragmento el la libro „Lingvo kaj Nacio“ de A. T. Baziev kaj M. Isaev; en la rubriko „Lingvaj temoj“ sub la redakto de J. Szerdahelyi — „Pri la lingvo de l'estonteco“; Kultura kalejdoskopo, La Ŝanco (poemo); Al niaj legantoj — de la ĉefredaktoro W. Gilbert, recenzoj, reklamoj, adresoj de dezirantoj korespondi, humuraĵoj, karikaturoj, infana anguleto k. a.

*(Sekvas sur p. 25)*

*En Loveĉ k-do Ilija Ivanov dum tiu ĉi jaro gvidis sukcese du kursojn — por civitanoj kaj lernantoj.*

*Sur la foto: parto de la gekursanoj kun sia gvidanto.*





# TRA LA E★ MONDO

**E. A. BOKAREV—ELSTARA SOVET-  
TA SCIENCULO-ESPERANTISTO**

**Lige kun la 70-jariĝo de lia naskiĝo**

Se li ne estus forpasinta antaŭ tri jaroj, la esperantistoj el la tuta mondo celebrus la 70-an naskiĝ tagon de profesoro Evgenij Bokarev.



Sian vivon kaj agadon prof. Bokarev ligis intime kun la sciencesplora laboro, kun krea serĉado. Li merite ricevis la titolon de doktoro de la filologiaj sciencoj kaj akiris mondan famon kiel specialisto pri la nordkaŭkazaj lingvoj, la interlingvistiko kaj la internacia lingvo Esperanto.

Brakuminte la ideojn de l' interna-

Do, enhavo sufiĉe varia, internacia, interesa, aktuala, kiu certe kontentigos la dezirojn de la legantaro.

Bonsancon al „Paco“! Legu kaj disvastigu ĝin!

*Boris Popov*

ciismo jam dum sia juneco, prof. Bokarev farigis neŝancelebla esperantisto kaj disvolvis aktivan agadon por fondo de la unuaj Esperanto-rondoj en Rostov ĉe Dono. En la jaro de la juna soveta ŝtato li estis delegito de kongresoj de la sovetaĵ esperantistoj kaj eniris la konsiston de CK de ilia asocio.

Trapasinte kiel volontulo la rigoran lernejon de la Granda Patrolanda Milito de Sovet-Unio kontraŭ la faŝitaj invadintoj kaj hardita en la heroaj bataloj defende al Leningrad, la soveta patrioto Bokarev dum la postmilitaj jaroj kun nova forto manifestiĝas sur la lingvosciencia kampo. Respondeca scienca aganto en la sistemo de l' Akademio de Sciencoj de USSR, li multe laboris por la disvastigo de Esperanto en la soveta lando — instruis la lingvon, prelegis, partoprenis E-eldonadon, recenzis lernolibrojn kaj aliajn E-eldonaĵojn. Li estis unu el la fondintoj de la komisiono pri internaciaj ligoj de la sovetaĵ esperantistoj ĉe la Asocio de la Sovetaĵ Societoj por Amikeco kun Eksterlando. Sub lia redakto aperis du grandaj vortaroj — Rusa-Esperanta kaj Esperanto-Rusa kiel krono de lia senlaca agado. Tiuj verkoj estas altvalora heredaĵo en la trezorejo de l' Internacia Lingvo. Ili multe kontribuis por la lasttempaj sukcesoj de la sovetaĵ esperantistoj.

Dum la 60-aj jaroj la figuro de prof. Bokarev reliefigis frunte de sovetaĵ delegitaroj al kvar UK de Esperanto — en Sofio, Hago, Budapeŝto kaj Vieno. Dum la Sofia Kongreso, unu el la plej amasaj en la historio de Esperanto kaj kun grava politika kaj kultura signifo, li prezentis salutojn je la nomo de la esperantistoj el la granda Soveta Lando, kaj liaj vortoj estis renkontitaj kun aparta atento kaj intereso. La fakto, ke li estis elektita kiel membro de la Akademio de Esperanto parolas pri lia internacia aŭtoritato de elstara lingvisto. Tre aktiva estas lia partopreno

en la batalo de la pacamaj fortoj kiel membro de la Mondpaca Esperantista Movado (MEM). Lin estimis la progresemaj esperantistoj el ĉiuj landoj.

Prof. Evgenij Bokarev estis granda kaj sincera amiko de la bulgaraj esperantistoj, kies agadon li admiris. Pri la tagoj de la 48-a UK de Esperanto li forportis karajn rememorojn, ekaminante, kiel li mem diris, nian belegan ĉefurbon kaj ĝiajn homojn, kiuj ĉie ĉirkaŭis la kongresanojn per kora gastameco.

Sur la bulgara tero la soveta sciencisto-esperantisto diris testamentajn vortojn: „Nia Esperanto-movado ebligas al ĉiuj pacamaj popoloj interkompreni-

ĝi bone, interŝanĝi pensojn, sentojn kaj kulturajn valorojn; ĝi kreas kondiĉojn por firmigo de l' amikeco kaj la konfido, kontribuas por disvolvigo de la ideoj pri paco inter la homoj sendepende de ilia sociordo, politikaj kaj religiaj konceptoj. En tio, laŭ mi, konsistas la baza signifo de la Esperanto-movado, en tiu direkto ĝi devas ankau evolui.“

Ĉe la nuna serenigo de la internacia atmosfero kiel aktuale kaj forte sonas la vortoj de tiu arda esperantisto kaj reprezentanto de la humanismo de l' sovetaĵoj homoj en la vicoj de la tutmonda Esperanto-movado!

*Nano Kjuĉukov*

## SCIENCAJ VESPEROJ EN BUDAPEŬTO

Belajn tradiciojn sekvas la budapeŝta E-Klubo „Konkordo“ per aranĝo de Sciencaj Vesperoj, kies celo estas aŭskulti kaj pridiskuti altnivelaĵojn prelegojn, parte informi pri novaj sciencaj atingoj, parte „kreskigi la rutinon de apliko de E-to por sciencaj celoj“.

Jen la temoj de kelkaj prelegoj: La tajdo, Pri la varmo, La akvo-nodo de Kisköre, Konigo de la naturscienca literaturo ĝis nun en E-to, Aluminio — la hungara arĝento. Speciale interesaj estis la prelego de d-ro Otto Haszpra, kiu parolis pri siaj travivaĵoj dum sia ĉirkaŭgloba studvojaĝo en 1968—69, la prelego de la astronomo Aurel Ponori Thewrewk pri la atingoj de la Luno-esplorado, la parolo de d-ro Janos Székely pri la kriminalistiko kaj kriminologio. En la nuna jaro estos paroloj ankau pri historiaj kaj arthistoriaj temoj.

La Sciencaj Vesperoj okazas ĉiun duan lundon, tre ofte ankau la kvaran lundon de la monato.

Jam daŭras la medicinsciencaj prelegoj ankau en la hungara grupo de la Universala Medicina E-Asocio. Meze de novembro en la ejo de la grupo (Hospitalo László) okazis tri medicinaj prelegoj. D-ro Lajos Molnar parolis pri la ekzantemaj malsanoj, d-ro Julianna Farkas — pri la trahomo kaj d-ro Eva Stancz — pri la flegado de la novnaskitoj. La prelegojn sekvis alparoloj kaj demandoj.

La scienca agado en „Konkordo“ kaj en la Hospitalo „László“ multe kontribuas al evoluado de la scienca esprimovo de Esperanto.

*L. K.*

*El „Esperanto-Magazin“, n-ro 1/1974*

## SUKCESA LETERVESPERO EN VILJANDI

La E-Klubo en Viljandi, USSR, aranĝis sian tradician letervesperon je la 8 de februaro. Entute ni ricevis 100 salutojn kaj 45 korespondezirojn el socialismaj kaj kapitalismaj landoj.

La Vespero sukcesis bone. Kunvenis preskaŭ 50 anoj. Oni sidis kune ĉe teo-tablo. Estis legitaj interesaj salutoj kaj montritaj poŝtkartoj pere de epidiaskopoj. Fine oni disdonis adresojn por korespondado.

*Sally*

## Letero el eksterlando

*Tokio, 20. 12. 1973*

### *Karaj geamikoj,*

Ni estas japanaj geknaboj, kiuj lernas Esperanton en alta lernejo sub la gvido de S-ro Fusacugu Kido, kaj nun intencas interŝanĝi fotojn kun geamikoj el aliaj landoj. La fotoj, kiujn ni deziras interŝanĝi, estas el nia lerneja vivo — lernado de lecionoj, sportaj kunvenoj kaj konkursoj, ekskursoj aŭ piknikoj, festivaloj ktp.

Dimensioj de la fotoj: pli grandaj ol 12×16 cm. Ĉiam pli ol 3 aŭ 5 folioj. Bonvolu skribi klarigojn pri la enhavo de la foto sur ĝia dorso.

Se vi ne estas instruisto aŭ lernanto, bonvolu transdoni nian deziron al tiuj, kiuj havas la saman deziron interŝanĝi. Kompreneble, ni ankau sendos tiajn fotojn al ili.

Niu adreso: Esperanto-Klubo de H cn Kooko, Mukojima 3 — 37 — 25, Simida TOKIO, 131 — Japanujo.



## ENKONDUKO EN LA FONOLOGION DE ESPERANTO

de prof. d-ro Stojan Ĝuĝev

## Antaŭparolo

La rapida progreso kaj disvastiĝo de la Internacia Lingvo tra la tuta mondo post la dua mondmilito starigas ĉiam pli akre ĉe l' adeptoj de tiu lingvo la problemon pri la unueco de l' artikigo kaj de la prononco en Esperanto, pri la „normigo“, t. e. pri la fikso de la normala valoro de la Esperantaj fonemoj, pri la kadencado de la Esperanta frazo kaj pri la melodio de la parolo — unuvorte pri la ĝeneralaj principoj de la Esperanta fonetiko.

Precipe la novaj esperantistoj ofte devas streĉi sian atenton, por kompreni la dirojn de la diversnaciaj oratoroj, aktoroj, kantistoj aŭ simplaj interparolantoj, dum la malnovaj esperantistoj jam al kutimiĝis al la nacilingvaj strangaĵoj en Esperanto kaj facile divenas la nacian apartenon de sia konversacianto laŭ lia nacilingva prononco en Esperanto.

En la epoko de la rapidegaj komunikadoj inter la popoloj, de la radio, la televido, la parolanta filmo, la magnetofono kaj de la kosmaj rapidecoj, la grandaj lingvoj de la civilizo montras ian tendencon al interpenetro kaj reciproka influo, al internaciigo kaj „integriĝo“. Kaj multaj faktoroj kunagas por la kresko, stabiliĝo kaj unuecigo ankaŭ de iuj naciaj lingvoj, nome: intensa internacia vivo, perfektiĝo de la komunikiloj, popularigo de la scienco, de la kulturo ĝenerale, internaciigo de la komerco kaj ekonomio, de la tekniko kaj de la industrio. Tamen tiu ĉi evoluo de la cirkonstancoj estas ne malpli danĝera por la malgrandaj, malfortaj kaj ne sufiĉe stabiligitaj lingvoj — inkluzive por nia

Esperanto. Ĉiel ajn, la ŝokantaj diferencoj de prononco kaj la interpuŝado de malsamaj sonoj kaj nuancoj en la fonemiko de la internacia lingvo estas ĉiam ĝenanta faktoro por la facila interkomprenado kaj interkomunikado de la esperantistoj diversnaciaj kaj sekve por la disvastigado de Esperanto.

Tial urĝa devo de ĉiu konscia esperantisto estas deĵori por la lingva disciplino en nia movado, militi kontraŭ ĉia diverĝa aŭ splitiga faktoro en la internacia lingvo, inkluzive en ĝia fonetiko, korektante unue sian propran Esperantan prononcon kaj insistante pri pura, korekta elparolado dum la internaciaj renkontoj. Sed tiun ĉi lingvan batalon li povos entrepreni nur se li konas la elementojn, la ĝeneralajn principojn de la Esperanta fonologio.

## Fonologio, fonetiko kaj fonemiko

Kio estas fonologio?

Estas malfacile precizigi tiun ĉi terminon. La vorto „fonologio“ havas tre varian signifon. Ofte oni uzas ĝin kiel sinonimon de la termino „fonetiko“, kaj tiam oni difinas ĝin kiel „branĉon de la lingvistiko, kiu pritraktas la sonojn de la parolo“.<sup>1</sup>

Ferdinand de Saussure, tamen, proponas specialigon de la termino „fonologio“, kontraŭstarigante ĝin al la termino „fonetiko“, al kiu li atribuas la signifon de „scienco pri la sonoj

<sup>1</sup> J. Marouzeau, *Lexique de la terminologie linguistique*, 3-e éd., Paris, 1951; je la vorto „phonologie“.

en si mem, sendepende de la konkretaj lingvoj, en kiu ili (la sonoj) povas aperi". Dume, la fonologio pritraktas la lingvajn *funkciojn* (morfologian, semantikan k. c.) de la parolsonoj.

En la angla lingvo ekzistas pli oportuna termino: fonemiko. Ĝi permesas uzi la vorton „fonologio“ en la malnova kaj delonge stabiliginta signifo de *formado kaj uzo* de la sonoj. La studo pri la fonemoj de iu (konkreta) lingvo, pri ilia *uzado kaj ordigo* prezentas la *fonemikon* de tiu ĉi lingvo“.

„La fonetiko kaj la fonemiko de iu lingvo, prenita kune, formas ĝian fonologian sistemon — ĝian fonologion“.<sup>2</sup>

Ĉefa studobjekto de la fonologio estas la *fonemoj*. Sed kio estas fonemo? Laŭ PIV, fonemo estas „ĉiu el la unuopaj, aparte distingeblaj sonoj de la lingvo“. Tiu ĉi difino bezonas klarigon.

Por difini la fonemon, iuj lingvistoj-fonetikistoj implikas ĉefe la specifajn *artikigajn movojn* (tiel nomatajn „kinemojn“) de la voĉorganoj, *neglektante* ĝian akustikan karakteron. Tia metodo ŝajnas esti nepreciza — ĉar la lingvo prezentas unuavice sistemon de akustikaj signaloj. Por kompreni iun parolon, la aŭskultanto ne bezonas vidi la komplikajn artikigajn movojn en la buŝorganoj de la parolanto. Li (la aŭskultanto) juĝas pri la fonemo kaj divenas ĝin laŭ la impreso farita de la sonondoj sur lian aŭdorganon. Tial la *akustika imago* de la parolo, kiun li perceptas, estas la plej grava elemento (distingilo) de la fonemo. Krome, en la ĉeno de la parolsonoj la aŭskultanto (kaj ankaŭ la parolanto) povas rekte percepti la apartajn sonojn kaj tuj konstati, ĉu en fiksa momento iu sono persistas aŭ ĉesas resti identa al si mem, dum tamen en la ĉeno de la artikigaj movoj estas neeble distingi la apartajn ĉenerojn

(„kinemojn“), fiksi la limojn inter la movoj (la moveroj) de ĉiu aparta sono, resp. fonemo. La limigo kaj izolo de la apartaj sonoj en la fluo de la parolo estas ebla nur sur la fono de la akustikaj impresoj. Sed por priskribi kaj precipe por difini la sonojn de la parolo, nur la akustikaj signaloj ne sufiĉas. Oni nepre bezonas montri la artikigajn movojn de la parolorganoj. La akustika imago estas malfacile difinebla kaj priskribebla.

Tial Ferd. de Saussure difinas la fonemon kiel „sumon de akustikaj impresoj kaj artikigaj mov(er)oj, kiuj formas la plej malgrandan lingvo-unuon“. La fonemo sekve estas samtempe *aŭdata* kaj *prononcata*, t. e. *artikigata* elemento de la parolo.<sup>3</sup>

Saman aŭ similan difinon proponas J. Marouzeau: Fonemo estas „elemento distingebla ĉe la analizo de la artikigita parolo kaj difinita, unuflanke, per la situo de la parolorganoj kaj per la movo akompananta aŭ kondiĉanta (kaŭzanta) la fluon de la (elspirata aŭ enspirata) aero, kaj, aliflanke, per la akustika impreso, kiun ĝi (la elemento) elvokas“.<sup>4</sup>

La usona lingvista skolo, kiu lastatempe tre vigle sin okupas pri la problemoj de la fonologio, havas iom malsaman koncepton pri la naturo de la fonemo. Laŭ Bloomfield, „la plej malgranda lingvo-unuo, en ĉiuj lokoj identa al si mem kaj rekonebla kiel signo de la parolo, estas nomata fonemo aŭ distingiga sono“.<sup>5</sup> G. K. Zipf opinias, ke la fonemo estas „ideala modelo aŭ kopio, al kiu la parolantoj devas proksimiĝi“.<sup>6</sup>

<sup>3</sup> Ferd. de Saussure, Cours de linguistique générale, Paris, 1931, p. 65.

<sup>4</sup> Lexique de terminologie linguistique, Paris, 1951, eld. en rusa lingvo, Moskvo, 1960 p. 327.

<sup>5</sup> L. Bloomfield, A Set of Postulates for the Science of Language, en „Language“, 2, 1926, p. 153—164.

<sup>6</sup> G. K. Zipf, The Psycho-Biology of Language, Boston, 1935, p. 195.

<sup>2</sup> G. L. Trager, The Field of Linguistics, Norman (Okla.), 1949, p. 5.



Laŭ la „Fundamento de Esperanto“ ĉiu simpla sono (fonemo) en la alfabeto de la internacia lingvo estas reprezentata (esprimata) de unu sola grafika signo (litero), kaj, reciproke, ĉiu signo korespondas al unu sola — ĉiam la sama — simpla sono (fonemo).

### Fonologiaj problemoj en la interlingvistiko

La fonologio starigas tre gravajn problemojn en la lingvistiko. Tamen ankoraŭ pli gravajn problemojn ĝi starigas en la kampo de l' interlingvistiko. Kaj la ĉefa problemo estas tiu pri la *ebleco* krei vivantan universalan planlingvon. Tia estas, ekzemple, la problemo: ĉu popoloj el ĉiuj partoj de la mondo aŭ gentoj kun tute malsamaj fonetikaj sistemoj, kun tute apartaj kaj ofte kontraŭstaraj artikigaj kutimoj povus adaptiĝi al iu internacia aŭ universala normo, al iu komuna „temperita“ gamo (skalo) de lingvaj (parolaj) sonoj; ĉu estas eble *bridi* la diverĝajn tendencojn, la tro grandajn deflankiĝojn (amplitudojn) en la artikigado kaj en la prononcado de la *Esperantaj* fonemoj fare de tiom multaj rasoj, gentoj kaj nacioj. Kiaj estas la rezultoj, la konkludoj de tiu giganta, en la historio de la homaro unika *lingvistika eksperimento*, kiun la esperantistoj entreprenis en tutmonda skalo? Tian eksperimenton provis entrepreni neniu ajn alia planlingvo. Tiu ĉi eksperimento estas decidiga por la solvo de la fundamenta interlingvistika problemo. Ĉar ju pli grandan disvastigon akiras la internacia lingvo tra la tuta mondo, des pli granda komplikaĵo kreiĝas en ĝia fonologia sistemo — des pli grava kaj aktuala fariĝas la problemo pri la lingva unueco de Esperanto, precipe pri la unueco de ĝia prononco. Ĉar iom post iom — pro la naturo mem de sia

funkcio de tutmonda lingvo — Esperanto fariĝas *fokuso*, en kiu kolektiĝas kaj *interpuŝiĝas* la specifaj sonoj, la fonologiaj strangajoj de ĉiam pli kaj pli granda nombro da nacilingvaj parolantoj. Aŭ, pli ĝuste, ĝi fariĝas areno, sur kiu luktas la fonetikaj sistemoj de ĉiuj lingvoj, idiomoj kaj dialektoj de la mondo. Ĉu el tiu ĉi lukto finfine kreskos la *amalgamo*, ia „temperita“ fonologia sistemo, en kiu *obtuziĝos* — dank' al ia kompromiso aŭ al ia muta interkonsento — la plej drastaj, la plej diverĝantaj aŭ ekstremaj tendencoj de apartaj fonetikaj sistemoj nacilingvaj, kiuj kunfandiĝos en harmonian, „bone temperitan“ (laŭ la esprimo de T. S. Bach) sistemon internacian? Almenaŭ ĉe la nuna stadio de evoluo de nia lingvo, la prononco de la mezklera esperantisto (t. e. atinginta la mezan nivelon de lingva posedo) ĉiam pli kaj pli spegulas ne nur la lokajn (etnajn) gramatikajn idiotismojn (apartecojn) — morfologiajn, sintaksajn (de frazkonstruo) ktp. — sed ankaŭ kaj precipe la fonologiajn strangajojn kaj specifajojn de plej diversaj lingvoj: naciaj, gentaj, regionaj, lokaj. Kaj — kiom ajn stranga kaj paradoksa aspektus tiu ĉi demando — oni rajtas sin demandi: ĉu la rapida, antaŭtempa kaj nepreparita progreso de Esperanto ne prezentas seriozan danĝeron por ĝi mem? Ĉu tiu ĉi kreskado kaj disvastigado de nia lingvo ne kreas grandan kaoson en ĝia fonologia sistemo, se tiu ĉi sistemo ankoraŭ ne estas unuecigita kaj stabiligita?

Tiajn kaj multajn aliajn gravajn problemojn starigas la fonologio en la kampo de la interlingvistiko kaj de la esperantologio. De ilia solvo dependas la plua evoluo, la kreskado kaj la disvastigado de Esperanto en la proksima estonteco.

(Sekvas en n-ro 5)



# KOLERAS MIA PAĈJO

de Agnia Barto

Ĉar mi ricevis duon,\*  
(malĝuste mi dividis),  
koleris mia paĉjo,  
sed voĉon ne laŭtigis.

Preferus mi, ke paĉjo —  
elmontru la koleron:  
ke krii, ĵetu forkon,  
frakasu supsteleron.

Ne, li nenion diras.  
Li estas nur silenta.  
Mi kvazaŭ ne Ivanĉjo,  
sed estas kvazaŭ fremda.

Al mi li ne respondas,  
rimarki min ne volas,  
silentas dum la manĝo,  
dum teo ne parolas.

Indiferente pase  
rigardas sen afablo,  
mi kvazaŭ ne Ivanĉjo,  
sed estas kvazaŭ tablo.

De la silent' premite  
kuŝiĝu mi enlite.

El la rusa: Klara Rabinoviĉ  
Ĥarkov

\* Duo — malbona poento ĉe ekzameno en Sovetunio. La trad.

## Distroĵ

### Eksterlanda humuro

ERARA DIAGNOZO


Kuracisto esploras la maldekstran okulon de paciento.

— Por mi estas facile konstati, de kio vi malsanas. Tio ne estas nur simpla troŝarĝo de la okulo, sed ankaŭ sufero de via nerva sistemo. Mi vidas ĉiujn simptomojn de rena perturbo, grasan degeneron de la koro kaj malbonan sangocirkuladon. La nuran rimedon, kiun mi rekomendas al vi, estas jena...

— Mi petas, mi petas, — interrompis lin la paciento. — Ĉu ne estas jam la momento ekrigardi la alian okulon? Tiu, la maldekstra, estas artefarita, vitra okulo!

El la angla: Janka Daskalova

### ENIGMO



Horizontale: 1. Kajero por notoj.

- Vertikale:
1. Tempo, dum kiu la suno estas sub la horizonto.
  2. Speco de kirasita aŭtomobilo, kiu movas sin per turniĝantaj larĝaj ĉenoj anstataŭ radoj.
  3. Persono korigita kun alia pro inklino.
  4. Manĝebla riverfiŝo.
  5. Frato de patro aŭ patrino.





## KRIPTOGRAMO

|     |    |     |     |     |    |     |     |
|-----|----|-----|-----|-----|----|-----|-----|
| ĉu  | tu | vi  | o   | a   | ra | mas | .   |
| vi  | ra | de  | !   | vas | se | res | vi  |
| min | se | ?   | mo  | se  | na | vi  | to  |
| ti  | vo | gis | las | la  | es | fi  | ti  |
| flo | es | ro  | tus | es  | ,  | tus | ma  |
| no  | a  | ti  | mi  | a   | ki | !   | no  |
| ,   | jo | ro  | es  | zo  | tu | es  | flo |
| ma  | mi | rin | a   | ba  | ,  | cev | do  |

## KONCIZE

De 1959 ĝis 1973 la Fremdlingva Eldonejo en Hanojo eldonis pli ol 60 librojn en la Internacia Lingvo, kiuj ampleksas proksimume 9 000 paĝojn. La eldonejo nun komencas ambician planon, kies celo estas eldoni plurvoluman antologion de la vjetnama literaturo.

Ŝtata pedagogia eldonejo en Prago publikigis ĉeĥan libron „Historio de stenografio“ de prof. Jan Petrasěk, en kiu plurfoje estas menciita Esperanto kaj la utilo, kiun ĝi donis al ĉeĥaj stenografoj en iliaj internaciaj profesiaj kontaktoj.


La ĝenerala sekretario de Pola Esperanto Asocio, Andrzej Pettyn, havas reputacion de elstara aŭtoro de lernolibroj por la Internacia Lingvo. Nur en la jaro 1973 lernolibroj, legolibroj kaj informaj broŝuroj de A. Pettin aperis en eldonkvanto de preskaŭ 50 000 ekzempleroj.

## „INTERLIGILO“

Aperis n-ro 45 de „Interligilo“, organo de la Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Es-

## Kl. rigoj:

Eltranĉu folion granda kiel la kriptogramo mem. Faru truojn laŭ la skizo dekstre kaj metu ĝin sur la kriptogramon. Turnante la skizon kvarfoje en direkto de la horloĝa montrilo, vi tralegos malgrandan versaĵon kaj la nomon de ĝia aŭtoro. La komenco de a versaĵo estas signita per *sig*: to.



peranto-Asocio (IPTEA). Redaktoro — Asen Grigorov.

La gazeto enhavas ne nur multe da interesaj rubrikaj pri komunikado, radio, televido, radio-amatorismo, sed ankaŭ pri aliaj demandoj: filatelo, rakontoj, el la scienco kaj la vivo, internacia humuro, proverboj, korespondadoj. En la lasta numero aperis nova originala rakonto de Nevena Nedelčeva.

La riĉa, varia envavo kaj la senripoĉa lingvo faras ĝin interesa kaj utila legaĵo por ĉiu esperantisto. La gazeto estas redaktata nur en Esperanto. Aperas en 16 paĝoj.

La bonkvalita papero, klara preso, agrabla kovrilo donas al la lasta numero bonan aspekton. Abono por 1974 (6 numeroj) kostas: por Bulgario 1,20 lev., por Sovet-Unio 1,75 rubl., por aliaj landoj 1,15 us. dol. aŭ egalvaloro, 12 intern. resp. kuponojn.

Adreso: Sofia C, Poŝtenska kutija 25, „Interligilo“.

*Individua abono al „Bulgara Esperantisto“ estas ebla. Sendu sumojn rekte al la kancelario!*



## **INTERNACIAJ KURSOJ KAJ SEMINARIO DE ESPERANTO POR INSTRUISTOJ**

**Bulgario — Burgas, Meden Rudnik**

*Sub la aŭspicio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)*

### **I. INTERNACIAJ ESPERANTO-KURSOJ POR INSTRUISTOJ**

**5—24 de aŭgusto 1974**

- I grado — komencantoj
- II grado — progresintoj
- III grado — por instrurajto

### **II. INTERNACIA PEDAGOGIA ESPERANTO-SEMINARIO**

**11—24 de aŭgusto 1974**

por instruistoj kaj kursgvidantoj de Esperanto, por perfektigo kaj diplomigo.

**Kotizoj por eksterlandanoj:** por la kursoj — 100 levoj, por la seminario — 70 levoj aŭ egalvaloro, inkluzivantaj loĝadon, nutraron kaj instruadon.

Ĉe neebbla transpago kotizo estas akceptebla ĉe la alveno, sed kun anticipa averto.

**Transpagojn** adresu al: Bulgario, Sofio, Ĉrez Bălgarska Vănsnotărgovska Banka do D. S. Kasa Blagoevski Rajon, Smetka 185/2553 na Sofijski Okraĵen Esperantski Komitet.

Pri ĉiu transpagita sumo informu tuj per letero.

Ĉar la nombro de la partoprenantoj estas limigita, ĉe akcepto de kandidatoj validas la pli frua aliĝo kun antaŭpago.

Oni ne rajtas havi kun si infanojn en la komuna loĝejo.

Por pliaj informoj adresu vin al: *Okrăfen Esperantski Komitet bul. Ĥristo Botev 97, Sofia 3, Bulgario. Telefono 31-00-29.*

---

## **LITERATURA „PATROL“ - KONKURSO EN ITALIO**

La itala rondo „La Patrolo“ organizas, enkadre de la 35-a Itala Esperanto-Kongreso en Verona (septembro 1974), literaturan konkurson, kiun povas partopreni ĉiu esperantisto en la mondo.

Ĉiu rajtas konkursi en ĉiu branĉo nur per unu verko, neniam premiita kaj neniam aperinta prese.

La branĉoj estas:

- a) originala poezio (maksimume 50 versoj);
- b) originala prozo (maksimume 200×65 tajpitaj spacoj);

La verkoj estu tajpitaj kun interlinia spaco. Oni sendu kvar kopiojn de ĉiu konkursaĵo. Sur ĉiu kopio estu skribita:

- a) la branĉo, por kiu ĝi estas destinita;

b) la pseŭdonimo de la aŭtoro.

Al la sendaĵo estu aldonita koverto entenanta slipon kun la pseŭdonimo, nomo kaj la adreso de la aŭtoro. Sur la koverto oni skribu nur la branĉon kaj la pseŭdonimon.

Oni enmetu ankaŭ tri respondkuponojn por sekretariaj elspesoj.

Validas nur la konkursaĵoj senditaj antaŭ la 1-a de julio 1974 (laŭ poŝta stampo).

La rezultoj estos diskonigitaj dum speciala kunveno okaze de la Itala Esperanto-Kongreso. La antaŭviditaj premioj estas maksimume tri (1-a, 2-a, 3-a) por ĉiu branĉo. Oni sendu ĉion al adreso:

*Premio „Luciano Cattorini“, literatura rondo „La Patrolo“, via Pantano, 17 — 20122 Milano, Italio,*

Kiel ni jam sciigis, ĵurnalo „Oteĉestven Zov“ en urbo Vraca komencis aperigi konstantan ĉiumonatan rubrikon „Esperanto — lingvo de l' amikeco“. Unuafoje ĝi aperis je la 14. XII. 1973.

En la citita rubriko la 25-an de januaro ĉ. j. aperis artikolo „Esperanto en la lernejoj“, sen montrado de la aŭtoro. En ĝi oni pritraktas la nunan staton de la E-instruado en la lernejoj mondscale. En la informo „Vraca — ekzemplo imitinda, 340 junaj esperantistoj“ Bojĉo Mladenov priskribas la sukcesojn de la ĝelernantaj E-societoj en la urbo, nome „Verda Raketo“ — ĉe gimnazio „Ĥristo Botev“ (160 membroj), „Anne Frank“ — ĉe faklernejo pri teksaĵo (125 membroj) kaj „Julio Baghy“ — ĉe faklernejo pri vestkudrado (58 membroj).

En la ĉiutaga ĵ. „Rabotniĉesko Delo“ Sofia (12. I. 1974) aperis artikolo „Vaste konata en fremdlando“ de la bulgara bibliografo Dimitr Boŝnakov pri la tradukoj de verkoj de nia eminenta verkisto Georgi Karaslavov lige kun lia 70-jara jubileo. Oni mencias la fakton, ke unue Karaslavov estis tradukita en Esperanton.

En la ĉiutaga ĵurnalo „Oteĉestven Front“, (15. I. 1974): informo de A. Georgiev pri la nacia ĝelernanta E-konferenco en urbo Haskovo.

En la sama ĵurnalo (7. II. 1974) — informo „Esperantista vespero dediĉe al G. Karaslavov“ — pri la celebrego de la verkisto fare de la ĉefurba esperantistaro.

En la semajna literatura ĵ. „Literaturen Front“ (17. I. 1974): artikolo (la aŭtoro ne signita) pri la fremdlingvaj tradukoj de la verkoj de G. Karaslavov. Estas menciitaj ankaŭ la tradukoj en Esperanton.

En ĵ. „Zarja na Komunizma“ — u. Loveĉ (31. I. 1974): informo de Ilija Ivanov pri forveturo de grupo da esperantistoj el Loveĉ al la ripozejo de Pamporovo por partopreni la Vintran E-Semajnon, organizitan de la Distrikta E-Komitato en Smoljan.

En la literatura revuo „Plamak“ (n-ro 1 de jan. 1974): artikolo „Geo Milev, — eldonoj de liaj verkoj en fremdlando“ de Elena Furnaĝieva. La aŭtorino mencias ankaŭ la du Esperantajn eldonojn de la poemo „Septembro“.

En la ĉiutaga ĵ. „Ĉernomorski Front“ — urbo Burgas (2. II. 1974): artikolo „La E-movado — progresema kaj proksima al la popolo“ de Kaljo Bjandov, prezidanto de la Distrikta E-Komitato en Burgas. La artikolo estas bonege argumentita.

En la ĉiutaga ĵ. „Veĉerni Novini“ — Sofia (6. II. 1974): informo pri okazonta celebrego de la verkisto Georgi Karaslavov fare de la sofia esperantistaro.

En ĵ. „Ŝumenska Zarja“ (15. II. 1974) informo „Niaj amikoj“ de Cvjatko Todorov pri la vigla perkoresponda amikeco de la ĝelernantoj el la ĝemeligitaj urboj Magdeburg (GDR) kaj Ŝumen (Bulgario).

En ĵ. „Rodopski Ustrem“ u. Smoljan (17. II. 1974): materialo „Ili konatigas la sukcesojn de nia patrujo“ de Stoil Ĉulov — pri la plenkunsido de la Distrikta Komitato de BEA en Smoljan, kiu pritraktis la E-agadon en la distrikto dum 1973 kaj markis novajn taskojn. La kunsido akceptis alvokon al la bulgara esperantistaro por streĉa E-agado dum la kuranta jaro, jubilea por nia lando.

En ĵ. „Oteĉestven Zov“, u. Vraca (22. II. 1974) en la konstanta monata rubriko: artikolo „Semajno de la Internacia Amikeco“ de Bojĉo Mladenov kaj informo pri la agado de la ĝelernanta E-Societo „Verda Raketo“ en la urbo dum la Semajno de la Internacia Amikeco.

En la semajna ĝelernanta ĵ. „Srednoŝkolsko Zname“ (26. II. 1974): informo „Vintra esperantista renkonto“ de Paulina Neĉeva — pri la Vintra E-Ferio en la fama ripozejo Pamporovo, organizita de la Distrikta Komitato de BEA en Smoljan.

## GRAVA E-ARTIKOLO EN LA CENTRA PARTIA ORGANO

Ĵurnalo „Rabotniĉesko Delo“, organo de CK de Bulgara Komunista Partio (eldonkvanto de 750 000 ekz.) aperigis je la 22-a de februaro ĉ. j. la artikolon „Al novaj agadsukcesoj!“ de Nikola Aleksiev — prezidanto de BEA.

La artikolo sumigas la sukcesojn de la bulgaraj esperantistoj dum 1973 j. kaj emfazas la ĉefajn taskojn dum la jubilea 1974 j.

**Redakta Komitato:** Kunĉo VĀLEV (ĉefredaktoro), Nevenka ALEKSIEVA, Marin BĀCEV, Ĥristo GOROV, Asen GRIGOROV, Stefka ĤRISTOVA, Nenko JONKOV, Krĉstju KARUCIN, Haim LEVI.

**Administra sekretario:** Minko CONKOVSKI

**Teknika aranĝanto:** Prodan PRODANOV

**Korektis:** Rajna Arnaudova

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 31-00-29

## DEZIRAS KORESPONDI

Pollando

### Bulgario

Boris Aleksandrov Stoev — selo Asenov, Loveŝko (kun ĉi pri ĉt)

Ognjan Vasilev Ivanov — ul. Rajko Daskalov 5 (A) 4 *Pernik*, (13-jara lernanto — kun ĉi pri sporto, bk, gram. diskoj)

Hristina Bojanova Mladenova — Sofio 3, str. Stara planina № 60 (16-jara knabino)

### Ĉeĥoslovakio

Matiašovska Hana — 46834 *Huntirov* n Jiz 37-a (29-jara, metalskulptistino — pri ĉt).

Matucha Slavek — 54371 *Hostinne*, Husistka 41 (21-jara oficisto — pri lingvistiko k. a.).

Matiaš Jiri — 56186 *Bohonova* 65 (33-jara zooteknikisto — pri abelbredado, gram. diskoj k. a.).

Špringlova Jaroslava — 16000 *Praha* 6, Podbabska 31/21 (20-jara studentino).

Vesela Helena — 28002 *Tri Dvory*, o. Kolín (24-jara oficistino — pri lit-ro, teatro).

### Francio

Daniel Corion — 12 rue Racine 93120 *La Courneuve* (filologo, poeto — kun ĉi pri ĉt).

### GDR

Friedrich Pfeiffer — GDR 943 *Schwarzenberg*, Str. d. Einheit 17 (61-jara dentisto — kun ĉi pri ĉt).

Joachim Erler — 943 *Schwarzenberg* Karlsbaderstr. 6 (37-jara instruisto — kun ĉi pri ĉt).

Heinz Schffler — 943 *Schwarzenberg* Brückenbergstr. 5 (52-jara policisto — kun ĉi pri ĉt).

Reinhard Dittrich — 9433 *Beierfeld* August Bebelstr. 23 (62-jara oficisto — kun ĉi pri ĉt).

Sabine Schreier — 9443 *Raschau/Erzg.* Ernst Schnellerstr. 84 (24-jara apotekistino — kun ĉi pri ĉt).

Christian Bönhoff — 943 *Schwarzenberg* Bärenackerweg 47 (34-jara dipl. ingeniero — ĉi pri ĉt).

Helmut Esseln — 943 *Schwarzenberg* Külsztr. 7 (45-jara — pri E-movado).

### Hungario

Pinter Erzsebet — 2800 *Tatabanya* 1 Ker, Fátalepi bckotó út. 4/1.

### Japanio

Japan Esperanta Koresponda Servo, ĉe KLEG, Synehigasi 1-11-46-204, Tojana-ka-si, 561.

Se vi deziras peti korespondinformojn de de tiu servo, nepre notu vian aĝon, sekson, profesion, preferon pri tempj k. s.

### Mongolio

Enhbaatar Poŝtkesto 919, *Ulan-Bator* (24-jara studento de pedagogio — kun gebulgaroj).

Anna Janovska — *Dobratycze* 21—508 Biala Podlaska woj. Lublin, kd. Zuki (18-jara lernantino — pri sporto, turismo, muziko geografio, bk, fotoj de aktoroj).

Grazyna Pukalska — 64-212 *Siedlec* 207, pow. Wolsztyn, woj. Poznańskie (18-jara lernantino — pri turismaj prospektoj pm. bk, gram. diskoj.)



Halina Kotulska — u. Tatrzańska 188-a, Łódź 93-239 (sur la foto: 17-jara — pri teatro, lit-ro, bk — kun samaĝuloj el ĉi).

Henryk Znajanski — Kozkoszowska, 22-510 *Uchanie* (23-jara — pri kino, sporto, muziko).

### Sovetunio

15 gelernantoj, 16—17 jaraj, en teknika lernejo, dez. korespondi kun samaĝaj gelernantoj kolektive. Ĉiuj — estontaj konstruistoj.

Adreso: KID — Esperanto, PTU-26, ul. Uniwersitetskaja 82, 340048, *Doneck*.

Vida Kuprite — p-o *Kapčunai*, reg. Pasvalis, 235 242. Litovio (18-jara lernantino — pri muziko, revuoj, pm, bk).

S. Depeckaite — 234900 *Saldutiškis*, Vidurinė mokykla IX kl. Utenas rajonas, Litovio (15-jara lernanto — pri sporto, estradaj kantoj k. a.).

A Kaminskas — Utenas rajonas, Saldutiskio poŝtas Saldutiskio vidurini m., Litovio (15-jara lernanto — esperantajoj, pm).

V. Lašinoskas — 234900 *Saldutiškis*, Vidurinė mokykla, IX kl. Utenas rajonas, Litovio (15-jara — pri sporto, E-demandoj, estra—daj kantoj k. a.).

K. Trinkunas — 234900 *Saldutiškis* Sarkius kaimas, Utenas rajonas, Litovio (17-jara lernanto — pri estradaj kantoj, bk, pm).

Kalev Katus — hiute 15-1, 200 013 *Tallinn*, Estorio (kun ĉi pri ĉt, moneroj).